


EL POPOLA ĈINIO

中國報道

8

1982





Diversaj brokatoj

La ĝuang-oj


Fotoj de CAI YANG kaj ZHU XIANMIN

Ĝuang-nacieco kun longa historio havas pli ol 12 000 000 membrojn kaj estas la plej grandnombra el la nacimallimultoj de Ĉinio. La ĝuang-oj loĝas ĉefe en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono riĉa je riveroj kaj montoj kaj fama pro siaj pitoreskaj pejzaĝoj. Tie la klimato estas milda kaj la plantoj tutjare verdaj. La ĝuang-oj okupiĝas ĉefe pri terkulturo kaj la loko estas abunda je diversaj produktaĵoj. Ili amas kanti, kaj iliaj kulturo kaj arto estas tre riĉaj. La ĝuang-a brokato, fame konata tra la lando de antaŭ centoj da jaroj, estas teksita de virinoj el diverskoloraj fadenoj, kaj uzata por fari belajn litkovrilon, tablotukon, antaŭtukon kaj mansakon kun nacieca gusto.




Ĝuang-aj knabinoj

Fiškaptado



Montvilaĝo



Vendejo en montvilaĝo



En teksado de brokato



Matena kuirado

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Knabino en suda Ĉinio
Foto de LAO BAI

SUR LA DORSKOVRILO:

En densa arbaro de Xishuangbanna
(Ĉinstila pentraĵo)
de WANG JINYUAN

KOLORAJ SERIOJ:

La ĝuang-oj
Vidindaj lokoj de Shandong
Fotoj pri naturaj belaj faritaj de E-istoj
Dinosaŭroj de Ĉinio
Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (5): La antikva urbo Kaifeng

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La haveno Huangpu
Gaja ekskurso
Gejunuloj en montvilaĝo

Ĉinaj filmoj de 1981	2
Vizito al la Sanhaja Filmstudio	6
Fama ĉina aktorino Zhang Yu	8
Vojaĝo tra la meza baseno de la Flava Rivero (5): La antikva urbo Kaifeng	10
Huangpu — la plej granda haveno en la sudo de Ĉinio	15
Centjara Bazaro de la Urbodia Templo	17
NIA KULTIVEJO: Rememore al pioniro Joĉaŝien	27
Lidia Zamenhof	30
Rakontas niaj perantoj	32
ESP-NOVAĴOJ	34
VIDINDAJ LOKOJ: Vidindaj lokoj de Shandong	24
Florado de arto	20
Vizito al la Huishan-a Argil-homfigura Fabriko de Wuxi	22
Eksterordinara amo	38
MIA VIVO: Maro — mia posteno	40
5000 JAROJ DE ĈINIO: Konkurado de cent skoloj en la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj	42
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Dinosaŭroj de Ĉinio	46
Iom pri la problemo de maljunuloj	48
AMIKECO	36
KALEJDOSKOPO	52
KURANTAJ AFEROJ	37
KORESPONDI DEZIRAS	32

JARABONTARIFO	Belgio	BF 180.00	Francio	FF 26 90	Jugoslavio	Din.	180	Portugalia	Esc	400	Usono	US\$ 6.00
Aŭstratio	FR Germanio	DM 10.80	Hispanio	Pis 600	Nederlando	Gld.	12.60	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$ 7.20
Aŭstrio	Britio	£ 3.00	Italio	Lit 52 00	Nov-Zelando	NZ\$	6.70					Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00
	Finlando	FMK 24.00	Japanio	Yen 1400								Par aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Ĉinaj Filmoj de 1981

NOVA REKORDO POR RAKONTAJ FILMOJ

La 23-an de majo 1982 la Ĉina Filmista Asocio okazigis en la antikva urbo Xi'an kunvenon por premii eminentajn filmojn, reĝisorojn, ĉefajn kaj neĉefajn geaktorojn kaj scenaristojn de la pasinta jaro.

La premiojn de rakontaj filmoj ricevis la filmoj "Familio Plena de Ĝojo", "Najbaroj", "Amo al la Hejmvilaĝo" kaj "La Blankserpenta Feino". Oni premiis unu aktualajan filmon kaj unu scienc-edukan filmon. Estas laŭditaj ankaŭ la filmoj "La Incidento en Xi'an", "Sha Ou" kaj "Angulo Forgesita de Amo" kaj aliaj. Premiitaj estis ankaŭ la plej bonaj scenaristo, reĝisoro, ĉefaj kaj neĉefaj geaktoroj, kameristo, desegnisto, muzikisto, muntisto kaj specialefektisto. La kunveno donis al la premiitoj la skulptaĵojn "Ora Koko" kaj "Flordio" kaj honor-atestilojn.

La premio "Ora Koko" estas donita al la filmo elektita de la famaj filmaj artistoj kaj filmaj kritikistoj el la produktitaj filmoj en la pasinta jaro. La premio "Ora Koko" estis iniciatita de la Ĉina Filmista Asocio en 1981, kaj la ĉi-foja estas la dua aljuĝo. La premio "Cent Floroj" estas donita al la filmo elektita de la enlandaj rigardantoj el la filmoj projekciitaj en la pasinta jaro. La premio "Cent Floroj"

estis iniciatita de la gazeto "Dazhong Dianying" ("Popola Kino"), kies ĉiumonata vendokvanto atingis 9.3 milionojn da ekzempleroj. Tiu premio komenciĝis en 1962, iam ĉesigita, tial la ĉi-jara estis la kvinajfoja.

La premio "Ora Koko" karakteriziĝas per sia faka aŭtoritateco kaj la premio "Cent Floroj" prezentas la opiniojn de la rigardantoj. Ili ambaŭ okazis unufoje ĉiujare. Per ili oni revuas la produktadon de la ĉinaj filmoj kaj ties atingojn. La premio estas sendube kompare ampleksa kaj ĝusta.

La abunda rikolto de la rakontaj filmoj en 1981 liveris bonajn kondiĉojn por la juĝado. Tiujare Ĉinio produktis 105 rakontajn filmojn, tiu kvanto superis tiun de ĉiu ajn jaro post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Dank' al la pliproduktado de filmoj kaj progreso en distribuado, pli kaj pli multe da homoj povas pli frue ĝui la novajn filmojn produktitajn de nia propra lando. Tion povas pruvi la nombrokresko de la juĝantoj de la premio "Cent Floroj". La juĝadon de la unuaj tri premiprezentoj partoprenis 117 000, 180 000 kaj proksimume 800 000 homoj respektive, dum tiun de la kvarajfoja premiprezento partoprenis 2 020 000 homoj kaj tiun de la ĉi-foja eĉ 2 100 000. La rezulto de la juĝado montris, ke altiĝis la

apreza povo de la rigardantoj. Nombro da rigardantoj ne nur plenigis la enketilon, sed ankaŭ skribis siajn opiniojn pri la filmoj.

VARIECO DE LA FILMAJ TEMOJ

Pro la granda kaoso de la kultura revolucio dum la dek jaroj antaŭ 1976, en la ĉina filmista rondo regis malvigleco. Tiam la filmaj temoj estis malmultaj. Tiun fenomenon oni ŝanĝis nur en la lastaj jaroj.

El la filmoj produktitaj en 1981 iuj temis pri gravaj eventoj en la ĉina historio. La filmo "La Incidento en Xi'an" priskribas kiel patriotaj generaloj de Kuomintango en 1936 faris perfortan admonon al Ĉiang Kaj-ŝek, kiu persistis en la batalo kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj obstine rifuzis batali kontraŭ la japanaj agresantoj. La filmo "La Liberigo de la Urbo Shijiazhuang" prezentas gravan kampanjon en la Popola Liberiga Milito de Ĉinio. En 1981 estis ankaŭ filmoj pri historiaj personoj kaj revoluciaj gvidantoj. La filmo "Intimaj Geamikoj" priskribas la batalan vivon de Cai E, la patriota generalo en la unuaj jaroj de la nuna jarcento. La filmo "La Revolucia Ŝtormo en Wuhan" spegulas la revolucian agadon de kamarado Dong Biwu, forpasinta ŝtata gvidanto de



La plej bona aktoro Zhang Yan (maldekstre), gajninto de la filmpremio "Ora Koko"; la plej bona aktoro Wang Xingang (dekstre), gajninto de la filmpremio "Cent Floroj"; kaj la plej bona aktorino Li Xiuming, gajninto de ambaŭ filmpremioj "Ora Koko" kaj "Cent Floroj".

Ĉinio, en liaj fruaj jaroj. Iuj filmoj temas pri la vivo de naci-malplimultoĵ aŭ pri legendoj, ekzemple "La Blankserpenta Feino" kaj "Ailifu kaj Sainaimu". Estis unuafoje surekranigitaj ankaŭ la fama verko "La Ĉefa Historio de A-Q" de Lusin kaj "Meznokto" de Mao Dun.

El la multenombraj realismaj filmoj, iuj, plenaj de humanismo, priskribas la socialismajn etikon kaj moralon, dum aliaj prezentas la ŝanĝiĝon de la urba kaj kampara vivo de post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Sukceson akiris ankaŭ la porinfanaj filmoj.

La premiitaj rakontaj filmoj kaj aliaj bonaj filmoj de 1981 ja estis elektitaj surbaze de tiu abunda rikolto. Tiuj rakontaj filmoj, ĉiu kun aparta karaktero, per siaj viveca enhavo kaj freŝa stilo plaĉas al la rigardantoj.

La filmo "Amo al la Hejmvilaĝo" temas pri la vivo en la sudĉinia kamparo. La bonkora

kaj honesta kamparanino Tian Qiuyue baldaŭ aranĝos la geedzan ceremonion por Tian Gui, adopta filo flegita de ŝi preskaŭ denaske, kaj sia filino Tian Cuicui. Ĝuste tiam la ŝtataj oficistoj Kuang Hua, la propra patro de Tian Gui, kaj Liao Yiping, lia propra patrino, sendas postuli la filon. La problemo, ĉu Tian Gui veturos urben aŭ restos en la kamparo, estigas korŝiran batalon inter la patrino kaj gefratoj. Dume estiĝas ankaŭ konflikto inter Kuang kaj lia edzino pri tio, ĉu ili venigu sole la filon aŭ ili venigu ankaŭ la bofilinon kaj eĉ la adoptan patrinon de la filo. La nobla Tian Qiuyue decidas post korŝira batalo, ke Tian Gui kun Tian Cuicui veturu al siaj gepatroj, dum ŝi sola restu en la kamparo. Tian Gui ĝojas pro la renkontiĝo kun siaj gepatroj, sed ne volas forlasi sian adoptan patrinon kaj sola veturi al la urbo. Kuang Hua, intime ligita kun la ordinara popolo, ja volas kune venigi siajn

filon, bofilinon kaj la adoptan patrinon, dume lia egoisma edzino Liao Yiping volas venigi nur la filon al la urbo. Pro la persistemo de Kuang Hua kaj Tian Gui, la tuta familio de Tian Qiuyue estas venigita en la urbon. Sed Tian Qiuyue ne povas toleri la malvarman trakton de Liao kaj forlasas ŝian hejmon. Pro tio Kuang severe kritikis sian edzinon. Tiam Liao rimarkis, ke Tian Qiuyue estas tiu kiu ne nur savis ilian solfilon, sed sukcesigis ilin fuĝi el la morta danĝero. Liao ege bedaŭras kaj fine konsentas revenigi Tian Qiuyue al sia hejmo.

La rakonto estas kvankam simpla, tamen enhavoriĉa. Ĝia stilo estas delikata kaj idilia kaj spiras fortan spiron de kamparo. En la komenco de la nuna jaro ĝi estis elektita por partopreni la Film-festivalon de okcidenta Berlino kaj estis laŭdita de la eksterlandaj rigardantoj.

TURNU LA KAMERON AL LA PRAKTIKA VIVO

Jam de la tridekaj jaroj la ĉinaj filmoj havis trajton speguli la realan vivon kaj piki la aktualan malvirtaĵon kaj krome estas meditigaj. Tiu realisma tradicio de la filmverkado lastajare plene realiĝis en la filma arto kaj eĉ havis iagradan disvolviĝon.

Analizante la filmojn pri la nunaj kaj historiaj temoj produktitajn en 1981, oni trovas, ke ilia komuna trajto estas ne eviti la kontraŭdirojn kaj kuraĝi speguli la realajn kaj historiajn faktojn. La filmoj ofte traktas la problemojn plej zorgatajn de la ordinara popolo kaj tuŝis ilian koron, pro kio ili vekas simpatian ĉe la rigardantoj.

Tion bone ekzemplas la rakonta filmo "Najbaroj". En troloĝata simpla etaĝdomo de iu instituto ĉiuj familioj preparas manĝojn en la homplena koridoro. Liu Lixing, eksestro de la instituto, kaj la nuna estro Yuan Yifang loĝantaj en la domo ambaŭ ricevas po unu novan apartamenton. Por ŝanĝi la malnovan ĉambron de Yuan Yifang en la publikan kuirejon longe deziratan de la najbaroj, Xi Fengnian fervora al la publikaj aferoj kverelas kun la sekciestro pri loĝdomoj, pro kio oni punas lin. Tio tre maltrankviligas Liu Lixing kaj li decidas ne transloĝiĝi en la novan loĝejon kaj ŝanĝi ĝin kontraŭ la malnova ĉambro de Yuan por kuirejo de la najbaroj.

Usona jurnalistino Iris, malnova amikino de Liu en la jaroj de la revolucia milito, venas lin viziti. Kaj Liu estas provizore

loĝigita en la nova loĝejo de Yuan, por gastigi la vizitanton. Tio estigis multajn miskomprenojn kaj ridindaĵojn.

Post nelonge Yuan estas nomumita estro de la urba komisiono de konstruado. Tute ne zorgante pri la loĝado de la ordinaraj homoj, li arbitre decidas konstruigi luksajn loĝejojn por gvidantoj kaj favorantoj. Por kiel eble plej rapide finkonstrui la domon, li eĉ intencas uzi materialojn de la tri domoj konstruitaj por la instituto, kio vekas indignon de multaj. Por tio Liu profundnokte vizitas sian malnovan amikon Fang Da, sekretarion de la urba komitato de la Partio, kiu ĝustatempe haltigas la konstruadon de la luksaj domoj.

Liu Lixing per sia konduto forte emocias la najbarojn. Sed ĝuste tiam, diagnozo de kuracisto konstatas, ke li estas trafita

de kancero. Antaŭ veturo al Pekino por kuracado, li ankoraŭ zorgas pri siaj najbaroj. Iun tagon de frua printempo, loĝantoj de la simpla domo ricevas novan loĝejon. En ĝojo pri tio, ili tamen estas profunde maltrankvilaj pri Liu Lixing.


La filmo "Najbaroj" estas laŭdinda ĝuste pro tio, ke ĝi traktas la problemon de loĝado, vaste zorgatan en la reala vivo; ĝi temas pri la vivo de la ordinaraj homoj. Pere de la konkretaj intrigoj, la filmo skurĝis la burokratismon, privilegion kaj komploton kaj laŭdis la noblan spiriton de la popolanoj kaj gvidantoj.

En reflektado de la socia reala vivo, estas ŝatataj de la rigardantoj la tri filmoj "Familio Plena de Ĝojo" priskribanta kontraŭdirojn inter bopatrino kaj bofilino kaj inter la edzinoj de la fratoj en kamparaj fami-

Liu Lixing en "Najbaroj", unu el la premiitaj plej bonaj rakontaj filmoj



Sceno el "La Incidento en Xi'an" montras, ke Zhou Enlai (maldekstre) analizas la politikan situacion kune kun Zhang Xueliang (la dua de maldekstre) kaj Yang Hucheng (dekstre).



lio, "Angulo Forgesita de Amo" priskribanta komplikan amon de kamparaj gejunuloj kaj "Sha Ou" priskribanta neflekseblan batalspiriton de sportistinoj.

NOVAJ PROVOJ

En 1981 ĉinaj filmistoj sukcese faris novajn provojn. Ekzemple, la filmoj "La Leviĝo de Nanchang" kaj "La Incidento en Xi'an", kiuj priskribas gravajn revoluciajn historiajn eventojn. Ili ambaŭ kondukas la rigardantojn en la mondfamajn kaj animskuajn historiajn eventojn per siaj vasta historieco, forta spiro de la epoko kaj modlo de historiaj personoj. Ĉio ĉi estis malofte vidita en la pasintaj filmoj.

En 1981 oni sukcese surscenis la novelojn "Funebro pri l' Forpasintino", "La Ĉefa Historio de A-Q" kaj "Medikamento" de Lusin kaj "Meznokto" de

Mao Dun. Kvankam la noveloj de Lusin ampleksas nur kelkmil ĉinajn ideografiajn, tamen estas multsignifaj, antaŭe neniu kuraĝis adapti ilin al filmo. La romano "Meznokto" entenas 345 000 ĉinajn ideografiajn kaj proksimume sesdek personojn. Oni rigardas ĝin kiel historian skizon pri la ĉinaj sociaj fenomenoj en la tridekaj jaroj. Kompreneble estas malfacile adapti ĝin. Malgraŭ tio la filmo kompare bone esprimis la ideon de la originalo kaj modlis la rolojn verosimilaj.

Krome, nemalmultaj filmoj rompis la jugon de la rutino kaj prezentis freŝan temon. La filmo "Xu Mao kaj Liaj Filinoj" priskribas kiel la maljunulo Xu Mao, kiu antaŭe amis la komunumon kiel sian hejmon, ŝanĝiĝis de bonkora kaj modesta home en egoisman kaj diskretan. La filmo priskribas ankaŭ la malsamajn suferojn de liaj fili-


noj. Ja per tio la filmo montras la animan vundon de la kamparanoj kaj tordiĝon de iliaj karakteroj kaŭzitan de la "dekjara kaoso". La filmo prezentas la verkon pli profunde ol la samtemaj filmoj en la pasinteco. Ankoraŭ aliaj filmoj prezentas apartajn naciajn trajtojn.

Kompreneble, iuj rakontaj filmoj iris zigzagan vojon en 1981. Jam malkaŝiĝis nesana tendenco en kreado kaj arto: falsaj historio kaj vivo kaj triviala arta esprimo. Tiuj tendencoj kaj eraroj troveblaj eĉ en iuj bonaj filmoj.

La ĉinaj rigardantoj esperas, ke la filmistoj produktos pli multe da bonaj filmoj post resumo de sperto kaj novaj provoj.




Sceno el "Amo al la Hejmvilaĝo" montras miskomprenon inter la geamantoj Tian Gui kaj Cuicui.



Vizito al la Ŝanhaja Filmstudio

“Komencu!” Kun tiu ordono mi vidis, ke antaŭ la kamero rapide skribas iu sidanta junulo en vesto de antikvulo. Jen sceno de la komedio “Amo kaj Kaligrafio” filmata de la Ŝanhaja Filmstudio. La filmo pri-skribas kelke da antikvaj junaj

Intertempe mi intervjuis Yan Bili, la reĝisorinon de la filmo. Ŝi estas 54-jara virino, fervora kaj energi-plena. Kiam ŝi estis 17-jara, hazardo kondukis ŝin al la scenejo. En la filmista rondo ŝi laboris kiel notisto kaj helpreĝisoro. Ŝi ankaŭ kunla-



Unu el la domoj de la Ŝanhaja Filmstudio

kaligrafoj. La intrigoj estas humuraj kaj zigzagaj. Ĵus fininte sian laboron en la famaj pitoreskejoj la montoj Taishan, Huangshan kaj Putuo de Ĉinio, la filmistaro nun eklaboris en la studio. En la granda kaj blindige luma laborejo staris antikvaj kioskoj, etendiĝis serpentumaj koridoroj, leviĝis parfumaj fumstrioj el incensujo kaj brilis imponaj vestoj, mi sentis, ke mi kvazaŭ estus en la antikva Ĉinio kaj gastus en altrangula domo.

boris kun Shen Fu, Zheng Junli, Zhang Junxiang, Huang Zuolin kaj aliaj famaj reĝisoroj. De 1965 ŝi reĝisoris rakontajn filmojn kiel “Malgranda Piedpilkista Teamo”, “La Sekreto de la Rivero Axia”, “Kion Celas la Amo” k.a., kiuj profunde impresis la rigardantojn.

“Al kio la filmo strebas en la arto?” mi demandis ŝin. “Ĝi estas komedio. Mi strebas al kvieta kaj malpeza stilo por montri la senĝenan vivon de la

antikvaj intelektuloj por ke la spektantoj ricevu el ĝi artan ĝuon. Sed tio, ĉu mia deziro realiĝos aŭ ne, dependas de ni ĉiuj, kaj precipe de ili. . .” respondis la reĝisorino, montrante la kameriston Shen Xilin kaj artan desegnistinon Jin Qifen. Shen estas fama kameristo en la ĉina filmista rondo. Lia lerta kaj originala kinematografio tre plaĉas al la kolegoj kaj rigardantoj. Jin ja estas juna, sed sperta. Ŝi scias multe pri la antikva arto kaj arkitektura ornamo.

Jam falis vespera krepusko, kiam mi eliris el la studio. Ankoraŭ ne estis malvarme en la tiea profunda aŭtuno. Susuris velkintaj folioj. Florbedoj dissendis bonodoron de tempo al tempo. Antaŭ la verdeta ofidomo staris aŭto produktita en la tridekaj jaroj, kiu estis eble rekvizito en filmado. Mia akompananto diris al mi, ke la tuta studio okupas areon de 67 000 kvadrataj metroj. Tio estas tre rara laborkondiĉo en la troloĝata Ŝanhajo.

La Ŝanhaja Filmstudio, konstruita en 1949, estas unu el la plej grandaj studioj de Ĉinio. En ĝi estas arta komisiono, teknika komisiono, literatura departemento, scenara sekcio, aktora trupo, produkta centro kaj teknika centro. Tie laboras 1 800 laborantoj, inkluzive de famaj scenaristoj kaj filmaj artistoj. De post sia naskiĝo ĝi jam produktis pli ol tricent rakontajn kaj teatrajn filmojn.


Ŝanhajo estas la lulilo de la ĉinaj filmoj. Por ĉasi kuriozajn novaĵojn iuj eksterlandanoj filmis tie dokumentajn kaj pejza-

ĝajn filmojn en la komenco de la nuna jarcento. En 1913 tie estis produktita la unua rakonta filmo de Ĉinio. Ekde la dudekaj jaroj en Ŝanhajo aperis unu post alia privataj filmaj kompanioj. Iuj progresemaĵ filmistoj jam en la frua periodo de ĉinaj filmoj komencis fari propran iniciaton.

Surbaze de tio naskiĝis la Ŝanhaja Filmstudio.

El la de ĝi produktitaj filmoj pluraj estis honoritaj kaj gajnis premiojn en- kaj eksterlande. En 1954 "Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai", la unua kolora filmo de Ĉinio, reĝisorita de Sang Hu, gajnis premion pro muziko ĉe la

Oka Internacia Filmfestivalo de Karlovy kaj premion de projekciado ĉe la Naŭa Internacia Filmfestivalo de Edinburgo. Ĉefministro Zhou Enlai, tiam ĉeestanta kunvenon en Ĝenevo, invitis la film-majstron Chaplin rigardi ĝin kaj la filmo ricevis lian laŭdon. "Nova Historio de



"Amo kaj Kaligrafio" en filmado



Subĉiela filmado

Veterano”, la unua larĝekrana kolora filmo de Ĉinio reĝisorita de Shen Fu, ricevis premion pro tekniko ĉe la Moskva Internacia Filmfestivalo. “Korbopilistino N-ro 5” kompilita kaj reĝisorita de Xie Jin ricevis arĝentan medalon ĉe la Sesa Tutmonda Junulara Festivalo kaj la de li reĝisorita “Ruĝa Virina Taĉmento” la premion Bandung.

En la pasintaj jaroj la studio produktis kelkdek rakontajn kaj teatrajn filmojn kaj laboris super novaj temoj, farante kuraĝajn provojn por variigi la stilon kaj formon. La filmoj “De Sklavo al Generalo” priskribanta la vivon de sklavo kaj “Familio Plena de Ĝojo” priskribanta kamparanan vivon estas tre ŝatataj de la spektantoj.

De post sia fondiĝo la studio elkulturis multe da artistoj. Aro da junaj multe esperigaj aktoroj freŝigis la ĉinan filmistan rondon, ekzemple Xu Yinhua, la scenaristo de “Strateto”, estas la plej juna verkisto en la Ŝanhaja Filmstudio. Antaŭe li laboris kiel lakisto en la studio kaj en vicigis en la filmistan rondon nur dank’ al sia diligenta memstudado. Estas ankaŭ Yang Yanjin, la reĝisoro de tiu filmo, estas junulo.

La filmo “Bashan en Pluva Nokto” de juna reĝisoro Wu Yigong kaj fama veterana reĝisoro Wu Yonggang akiris la premion “Ora Koko” de 1980 dank’ al sia originala strukturo kaj lirika stilo. Wu Yigong diplomitiĝis el la Reĝisora Fakultato de la Pekina Filma Instituto. Li, silentema, entuziasmiĝas nur en filmado aŭ disputado kun aliaj.

Jam estis noktomezo, kiam mi adiaŭis la studion, kiu tamen estis ankoraŭ iluminata.

SHI MO:

Fama ĉina aktorino Zhang Yu

ZHANG Yu estas nova filmstelo de Ĉinio. En majo 1981 ŝi gajnis la unuan premion “Ora Koko” kaj la premion de la plej bona aktorino en la Kvara Filmfestivalo “Cent Floroj”.

La 25-jara Zhang Yu sin okupis pri arta prezentado ĉ. 10 jarojn. Ŝi naskiĝis en familio de kadro en Ŝanhajo. Jam en sia infaneco ŝi ekamis sporton, precipe naĝon, tablotenison kaj gimnastikon. Se ne estus hazarda ŝanco por ŝi fariĝi filmaktorino, eble ŝi jam fariĝus elstara sportistino.

En 1973, por varbi novajn aktorojn iu veterana reĝisoro de la Ŝanhaja Filmstudio venis en la mezlernejon, kie Zhang Yu tiam lernis. Kun scivolemo ankaŭ ŝi sin anoncis por la ekzameno. Sed ŝi ne kuraĝis havi tro grandan esperon antaŭ tiel multaj kandidatoj. Ŝi malfruis en la ekzameno. Kiam ŝi eniris en la ekzamenon, ŝi pretervole etendis sian langon, kriante: “Ho! Mi malfruis, mi malfruis!” Sed tiu ŝia “improvizita prezentado” profunde impresis la spertan reĝisoron. Kvankam ŝi ne montris ian grandan talenton, tamen la reĝisoro elektis ŝin kiel aktorinon. Post tio, li diris al aliaj: “Mi ŝatas la naivecon kaj senafekcon de Zhang Yu. Sen tiaj ecoj aktoro ne estas taŭga.”

Zhang Yu ludis malsamajn rolojn en la filmoj “Juneco”, “La Dua Printempo”, “La Baraĵo de Amikeco”, “Aolei Yilan” kaj “Ho! Lulilo” kaj altiris al si

atenton de la spektantoj. Tamen ŝia rimarkinda sukceso montriĝis en la “Amo sur Lushan-monto”. En tiu ĉi filmo ŝi unuafoje ludis la ĉefan rolon, usonan ĉinsangan junulinon venintan al Lushan-monto por turismo. Ŝi senmanke vidigis varman kaj liberan karakterojn de la junulino, ŝian hontemon en la unua amo, ŝiajn ĉagrenon, bedaŭron kaj ĝojon. La filmo faris grandan sensacion en la tuta lando.

Poste en la filmo “Bashan en Pluva Nokto” ŝi ludis la rolon de junulino influita de la maldkestrema penso. Estis malfacile ludi tiun junulinon kun fanatikeco kaj introspekto. Zhang Yu bone konis ŝiajn karakterojn kaj ludis senafekte, tiel ke la heroino impresis per vereco.

Ĝuste post la ludo en tiuj du filmoj ŝi estis honorita per la titolo “plej bona aktorino”. Ŝi diris al mi: “Mi ĵus komencis lerni iri kaj jam akiris tiel grandan honoron, mi kaj ĝojas kaj maltrankviliĝas. Iuj aktoroj estis nur momente famegaj. Mi volas klopodi la tutan vivon sur la vojo de arto.”

Lastatempe, en la filmoj “Strateto” kaj “Intimaj Geamikoj” Zhang Yu ludis du tute malsamajn rolojn. “Strateto” priskribas, ke en la dek-jara tumulto iu persekutita knabino devigite sin alivestis per knabaj vestoj por ebligi la vivon. Por pli bone ludi la rolon, Zhang Yu decide me fortendis sian belan longan hararon.

“Intimaj Geamikoj” estas filmo surbaze de la historia fakto, ke en 1913 Yuan Shikai, kiu uzurpis la postenon de la registara prezidanto kaj intencis restarigi monarkion, estis politike kaj milite kontraŭbatalita de la fama patriota generalo Cai E. La filmo priskribas, kiel Cai E, sub helpo de iu fama putino, eskapis el la reto de Yuan Shikai kaj poste levis standardon kontraŭ li. Vere estis malfacila problemo por Zhang Yu ludi la rolon de fama putino scipovanta verki poemojn kaj ludi sep-kordan muzikilon, ne nur pro ŝia senscio pri tiamaj okazaĵoj kaj moroj, sed ĉefe pro ŝiaj temperamentoj tute malsamaj al tiuj de la tiama putino. Por solvi la problemon, ŝi legis multajn klasikojn, imitis diversajn pozojn de belulinoj en antikvaj pentraĵoj kaj en malgrandaj broditaj ŝuoj malrapide iradis en koridoro.

Ankaŭ la projekciado de tiuj du filmoj rikoltis grandan sukceson. Filmorecenzisto skribis, ke Zhang Yu estas eminenta aktorino en ludo de malsamaj roloj.

Kiam ŝi kaj mi varme interparolis en salono de iu hotelo en Ŝanhajo, ŝi subite suspiris: “Mi amas la filman arton, sed kelkfoje mi sentis ĉagrenon. Ĉar mi ne ŝatas bruan scenon kaj ne volas esti atentita de la publiko. Kiel bone estus, se mi povus ofte resti en la hejmo por ion legi kaj pentri! En tiu ĉi flanko mi tre similas al mia patrino. Por mi, la aktorado estas kontraŭdira profesio.”

Zhang Yu estas aktorino diligenta en lernado. Ĉiumonate ŝi elspezis grandan parton de sia salajro por libroj. Ŝi legis multajn librojn, inkluzive dramojn de Ŝekspiro, romanojn de Balzac,



Zhang Yu ludas la rolon de Xiao Yu en la filmo “Strateto”.

filmteoriajn verkojn de Eisenstein kaj la belartan historion de diversaj landoj. Krom sporto, ŝi ŝatas ankaŭ pentradon kaj la klasikan muzikon. Por bone kulturi sin teorie, ŝi ofte aŭskultis lekciojn en dramaturgia instituto kiel kromlernanto. En filmado de eksterdomaj scenoj ŝi ĉiam kunportis notlibron por noti sian komprenon pri la rolo kaj impreson pri la lokaj moroj. Pri multaj artaj problemoj ŝi havis sian opinion. En sia not-

libro ŝi skribis: “Mi opinias, ke aktoro absolute ne devas facilanime ŝati ion kaj malŝati alion. Tio signifas, ke li ne interesiĝas pri alio kaj fermis al si horizonton.”

Je la adiaŭo, mi demandis ŝin, kian planon ŝi nun havas. Ŝi ridetis diskrete: “Mi volas malrapidigi la takton, legi pli multajn librojn, pensi pri iuj problemoj kaj kulturi min en arto por pli bone ludi en filmoj.”

Zhang Yu ludas la rolon de Zhou Yun, heroino de la filmo “Amo sur Lushan-monto”.



La antikva urbo Kaifeng

de ZHENG ZHENJIE

POST kelka restado en Zhengzhou mi daŭrigis la vojaĝon orienten laŭ la Flava Rivero al la antikva urbo Kaifeng.

LA ALTA DIGO DE LA RIVERO

Kun granda kvanto da leŭso la Flava Rivero torentas orienten, kaj en Taohuayu proksime al Zhengzhou finiĝas ĝia meza parto kaj komenciĝas ĝia malsupra parto, kiu etendiĝas ĝis la maro Bohai. Jen la rivero komencas sian vojaĝon sur la vasta ebenaĵo de Henan kaj Shandong.

Antaŭ mia forlaso de Zhengzhou mi aŭdis, ke la Flava Rivero ĉiujare restigas ĉirkaŭ 400 milionojn da tunoj da leŭso, tiel

ke la fluejo altiĝas meze dek centimetrojn ĉiujare. Nun la fluejo estas kvar ĝis kvin metrojn pli alta ol la bordoj, kaj eĉ pli ol dek metrojn en iuj lokoj. La rivero fariĝis maltrankviliga pendanta akvofluo. Ekzemple, la riverujo apud Kaifeng estas pli alta ol ĝia urbomuro. Se la digo breĉiĝus, la rivero inundus la tutan urbon. Dum la pasintaj jarcentoj la urbo estis inundita pli ol 30 fojojn, kaj la plej granda inundo forrabis la vivon de 340 mil el la 370 mil loĝantoj. Ĉiuj lokoj en la malsupra baseno estas minacataj de tiu pendanta rivero. Por malpliigi perdon de grundo en la supra kaj meza basenoj de la rivero kaj

leŭsoobstrukcon al la navigvojo, la loĝantoj nun streĉe plantas arbojn ĉe ambaŭ bordoj de la rivero.

Tiutage mi aŭte veturis orienten laŭ la digo kaj trovis ke la torenta rivero estas bone bridita de la grandaj digoĵoj ĉe ambaŭ bordoj. La digoĵoj ĉiu kun dikeco kaj alteco de almenaŭ sep metroj aspektas kiel monteĝoj rigardataj de malproksime. Sur la ebenaj digoĵoj prosperas arboj plantitaj de la popolo de la provincoj Henan kaj Shandong. Precipe post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni dikigis kaj altigis la nordan digon de Mengxian-gubernio ĝis la maro kaj la sudan digon de Zhengzhou ĝis la maro,

Parto de la pentraĵo "Scenoj apud Rivero en Qingming-festo"



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (5)

konstruis kaj rekonstruis pli ol 5 000 ŝtonajn talus-tegajojn, por kio oni movis pli ol 500 milionojn da kubmetroj da tero, duoble tiom por fosi la Panaman Kanalon.

La du plifortigitaj digoj kaj la kontraŭinundaj rimedoj malpliigis la minacon de la Flava Rivero al la lokoj en ĝia malsupra baseno. La rivero neniam breĉiĝis dum la pasintaj 32 jaroj, kvankam la akvo en ĝia malsupra parto ofte leviĝis ĝis la nivelo, kiu breĉis la digon antaŭ 1949. Ekzemple, en 1958 al la rivero okazis eksterordinara ŝveliĝo kun flukvanto de 22 300 kubmetroj sekunde, kio serioze minacis ĝian malsupran parton. Tamen la grandaj digoj restis sendifektaj post la furioza atako de la ŝveliĝo. Sed en 1935 ŝveliĝo kun flukvanto de nur iom pli ol 10 000 kubmetroj sekunde tamen

breĉis digon, inundis dek guberniojn de la provincoj Shandong kaj Jianguo kaj plagis pli ol du milionojn da homoj.

ANTIĴVAJ KONSTRUAĴOJ


Kaifeng estas antikva urbo kun historio de pli ol 2 000 jaroj. Kiel la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio dum pli ol 160 jaroj de 960 ĝis 1127 p. K. ĝi havis pli ol milionon da loĝantoj kaj estis la plej grandioza kaj bela en la lando kaj unu el la plej prosperaj grandaj urboj de la mondo.

Enirinte la urbon, mi tuj rimarkis la malsamecon inter Zhengzhou kaj ĝi. La antaŭa estas nova industria urbo kun dissemitaj fabrikoj, dum la lasta kun nemultaj loĝdomoj kaj modern-industriaj entreprenoj en siaj antaŭurboj havas movople-

najn stratojn kun lignaj domoj, butikoj, metiejoj kaj etkomercistoj, kolportistoj, kio impresas kiel prospera, antikva urbo. En Kaifeng mi vidis famajn antikvajn konstruaĵojn, kiel la Draka Pavilono, la Fera Pagodo, la Teraso Yu kaj la templo Xiangguo.

La Draka Pavilono konstruita en Qing-dinastio (1644-1911) situas ĉe la nordokcidenta ekstremo de la urbo. Ĝi estas granda halo tegmentita el flave glazuritaj tegoloj, sur bazamento dek tri metrojn alta. Antaŭe en la pavilono estis imperiestraj memortabuletoj destinitaj por festa adorkliniĝo de civilaj kaj militaj oficistoj, nun la konstruaĵo fariĝis turisma loko. Starante tie, oni havas panoraman vidon al la urbo.

Post kvin-minuta veturo suden de la pavilono mi atingis la



VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (5)

Feran Pagodon 54.66 metrojn altan. Ĝia ekstera muro estas masonita el grizblue glazuritaj brikoj, kiuj prezentas la koloron de fero, pro kio la pagodo ricevis tian nomon. Ĝi havas dek tri etaĝojn. La bazamento de tiu dek-tri-etaĝa pagodo estas sub la tero pli ol unu metron profunda. La pagodo konstruiĝis en la Norda Song-dinastio antaŭ mil jaroj. Ĝi elportis ne nur ventojn kaj pluvojn, sed ankaŭ inundojn kaj tertremojn, kio montras la sukceson de la antikva ĉina konstruarto.

En la antaŭurbo de Kaifeng sin trovas la Teraso Yu, antaŭe nomata la Teraso por Ludi Antikvajn Blovinstrumentojn. Laŭdire antaŭ pli ol 2 500 jaroj la fama ĉina muzikisto Shi Kuang ludis tie muzikilon. Sed plejparto de la loĝantoj nomas ĝin la Teraso Yu por honoro la legendan heroon Yu pro lia sukcesa subjugo de superakvo. La teraso fakte estas monteto sur kiu staras halo, koridoro, kiosko kaj turo dense ombrataj de arboj kaj parfumataj de floroj. Ambaŭflanke de la templo Yu estas po unu malgranda plaĉa korto. La okcidenta korto, nomata la Templo de Bena Akvo, estis destinita por kulti la famajn akvo-subjugintojn de diversaj dinastioj; la orienta estas la Templo de Tri Talentuloj kun ŝtonplato ene, kie estas notita, ke la famaj antikvaj ĉinaj poetoj Li Bai, Gao Shi kaj Du Fu vizitis la urbon, supreniris la terason kaj verkis poemojn dum vin-trinkado, pro kio oni konstruis la templon por rememorigi pri ili.

Najbare de la teraso staras originala pagodo sur kiu estas pluraj pagodetoj. Ĝi estas la plej antikva konstruaĵo en la urbo. Ĝia korpo estas masonita el delikate faritaj brikoj, ĉiu de 0.33 kubmetro kaj ĉiu kun ronda niĉo. La budhostatuoj en la niĉoj estas diversmienaj, kun versimilaj hararo kaj barbo. Ŝtonaj muroj de pluraj etaĝoj de la pagodo estas garnitaj per elegantaj ŝongravuraĵoj de Song-dinastio.

La templo Xiangguo, kiun mi vizitis kiel la lastan antikvan konstruaĵon, konstruiĝis en 555 p. K. de la Norda Qi-dinastio. En Song-dinastio la urbo estis nomata Dongjing. Tiam la loko, kie sidas la templo, estis la plej movoplena en Dongjing. Ĝi fariĝis bazaro pro la oportuneco de trafiko kaj la multeco de vizitantoj. Laŭdire la templo povis enteni dek mil homojn. Tie aktivis ankaŭ rakontistoj, akrobatoj, luktistoj, pupteatraj kaj ombroteatraj aktoroj, jonglistoj, sortodivenistoj kaj migraj kuracistoj.

La antikvaj Ok-angula Turo, Halo de Mahaviro kaj Sutro-konserva Domo en la templo staras sur la sama linio en la suda-norda direkto. En la Ok-angula Turo imponas ses metrojn alta statuo de Avalokitesvaro farita, laŭdire, el trunko de granda ginko. La vive impresanta statuo estas unu el la kolosaj milbrakaj lignaj statuoj de Avalokitesvaro maloftaj en Ĉinio.

ORIGINALAJ BRODAĴOJ

Inter la metiartaĵoj de Kaifeng la plej famaj estas brodaĵoj. Laŭ

historia literaturo, jam en Song-dinastio tie estis starigita brodejo kun pli ol 300 brodistinoj el diversaj lokoj de la lando ekskluzive por la imperiestra familio kaj korteganoj. Apud la templo Xiangguo estis la Broda Strato, ĉe kiu loĝis brodistinoj kaj vendiĝis ĉiaspecaj broditaj bildoj, ombreloj, ventumiloj kaj murtapiŝoj.

Post la pereado de la Norda Song-dinastio iuj brodistinoj, sekvante la korteganojn de la Suda Song-dinastio (1127-1279), iris al la sudaj urboj Suzhou kaj Hangzhou kaj la aliaj migris norden de la lando. Poste la brodarto de Kaifeng iom post iom malprogresis pro oftaj militoj, superakvego de la Flava Rivero kaj la mizero de la popola vivo. En 1955 la popola registaro veniĝis sep brodistinojn kun propra heredita tekniko de brodado, kolektis antikvaj brodaĵoj por studi la arton, fondis la Brodejon de Kaifeng kaj restarigis la tradician brodadon.

Mi venis en la brodejon kaj vizitis ĝian ekspozicion akompanate de brodejestro Wang. La ekspoziciejo estis granda. Ĝiaj muroj, tabloj kaj montrofenestroj estis plenaj de lerte faritaj brodaĵoj. Tie estis diversaj broditaj bildoj kun majstroverkoj de famaj ĉinaj pentristoj kiel fonto, ekzemple, "Ruĝaj Folioj kaj Cikado", "Salikoketoj", "Peonioj", "Kato Kaptas Manton", "Orfiŝoj Naĝas en Akvo", "Galopantaj Ĉevaloj", "Belulino" k.a. Vere estas malfacile distingi inter ili kaj la originaloj. Krome, troviĝis tie ankaŭ brodi-

VOJAĜO TRA LA MEZA BASENO DE LA FLAVA RIVERO (5)

taj viraj kaj virinaj pijamoj kaj roboj.

Min interesis la brodita bildo "Scenoj apud Rivero en Qingming-festo" kun longeco de 525 centimetroj kaj larĝeco de 25.5 centimetroj en montrofenestro. Ĝi estas farita laŭ majstroverko de pentristo Zhang Zeduan de la Norda Song-dinastio, kiu estas konservata en la Muzeo de la Imperiestra Palaco, Pekino. La bildo prezentas tiamajn domojn, butikojn, ĉarojn, boatojn kaj loĝantojn ambaŭborde de la rivero Bianshui en Kaifeng por vidigi la prosperajn metiindustriojn kaj komercon en la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio. La bildo estas tiel impona kiel la origi-


nalo. Sur la bildo estis elvokive broditaj pli ol 770 homfiguroj, 94 brutoj, 24 boatoj, pli ol 170 arboj kaj multaj ĉaroj, palankejoj kaj domoj. La verko montras la altan teknikon de la brodistinoj de Kaifeng.

Tie mi rigardis brodadon de pli ol 300 laboristinoj. Ĉiaj koloroj povas aperi sub ilia brodilo, same kiel sub peniko de pentristo. La brodejestro diris al mi, ke surbaze de la heredita ordinara brodmaniero de la Norda Song-dinastio, oni elpensis dekojn da modernaj brodmanieroj kaj disvolvis la simplajn unu- kaj duflankajn brodmanierojn en novajn manierojn de duflanka malsamkolora bro-

dado kaj duflanka malsamkolora kaj malsambilda brodado.

Ĉe la fino de mia vizito ŝi diris al mi ankaŭ, ke "Scenoj apud Rivero en Qingming-festo" kaj aliaj brodaĵoj ricevis laŭdojn de ĉinaj kaj alilandaj klientoj kaj vizitantoj. Iu japana kaligrafo faris por la supre menciita brodaĵo la jenan surskribon: "La brodaĵo plaĉa, la tekniko mirinda". La brodaĵo altiris iun entrepreniston el Hongkongo, kiu akiris du kontraŭ 100 000 juanoj. Nun brodaĵoj de Kaifeng vendiĝas en 14 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Ĉiujare eksterlandaj komercistoj venas al tiu urbo por viziti la brodejojn aŭ mendi ĝiajn varojn.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Xi'an
2. Kaifeng
3. La haveno Huangpu
4. Sanhajo
5. Shandong-provinco
6. Wuxi
7. Weihai
8. La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono
9. Heilongjiang-provinco
10. Yunnan-provinco
11. Sichuan-provinco
12. Gansu-provinco
13. La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio

MITAJ RAKONTOJ EN BILDOJ

NEZHA KIRLAS LA MARON

La rakonto estas citita el *Romano de Kanonizitaj Dioj*, alia fama mita romano de Ĉinio. Brava knabeto Nezha por savi iun infanon mortigis princon de iu el la drako-reĝoj. La drako-reĝoj, kiuj regis pluvon kaj akvon, sekve levis ondegojn por damaĝi la loĝantojn. Por ke la polamasoj ne suferu pro li Nezha sin mortigis. Sed iu feo per magio reenkarnigis lin kaj fine li venkis la drako-reĝojn per magiaj armiloj. Ĉiuj bildoj estas koloraj.

Eldonita de "El Popola Ĉinio"

Numero: 88-Es-173P 18 X 26cm. 84 pĝ.

Prezo: £1.10 US\$2.30

Mendu ĉe: Libroservo de UEA

Peranto de EPĈ

aŭ Esperanta Sekcio de la Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN),
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Legu

HUA WEN:

Huangpu – la plej granda haveno en la sudo de Ĉinio

EN 1919 d-ro Sun Jatsen, pioniro de la ĉina demokratia revolucio, elmetis planon konstrui grandan havenon ĉe Huangpu, apud Kantono en la sudo de Ĉinio, en sia verko "Principoj de Landkonstruo". Tamen en la tridek jaroj (1919-1949) dum la regado de Kuomintang tie estis nur kajo kvarcent metrojn longa kaj kvar simplaj staploj. En la haveno oni povis en- kaj elŝipigi nur 400 000 tunojn da varoj ĉiujare. Krom du grupoj funkciigataj per gaso, tie ĉiuj laboroj de ŝarĝado kaj malŝarĝado estis plenumitaj per homaj fortoj.

Kiaj ŝanĝiĝoj aperis en la haveno dum la tridek du jaroj post la naskiĝo de la nova Ĉinio? Ĉu realiĝis la deziro de d-ro Sun Jatsen?

Por solvi tiun problemon, mi speciale vizitis la havenon.

Estis serena marta tago, antaŭtagmeze. Forlasinte Kantonon, mi veturis orienten dudek kvin kilometrojn laŭ la larĝa kaj

ebena ŝoseo kaj atingis la havenon Huangpu.

Huangpu estas la plej frua haveno, kiun konas la ĉina historio. Jam en Tang-dinastio antaŭ pli ol mil jaroj, tie ankriĝis eksterlandaj komercaj ŝipoj.

Huangpu estas bona natura haveno sur la Perla Rivero. La distanco de tiu haveno ĝis la Suda Ĉina Maro estas 65 marmejloj kaj tie la akvo fluo estas malforta, sed la akvo profunda. Ĝi neniam glaciĝas kaj ĉiam favoras por navigado. Krome, la trafiko estas oportuna. La akvo vojo, ŝoseo kaj fervojo kondukas al Kantono kaj proksimaj provincoj.

Mia vojqvidisto diris al mi, ke por efektiviĝi la deziron de d-ro Sun Jatsen pri konstruo de granda haveno en suda Ĉinio, nelonge post sia naskiĝo, la popola registaro elspezis monsumon por dragi la navigvojon kaj rompi rifojn, tiel ke la navigvojo antaŭe taŭga nur por 2-3 000-tonelaj ŝipoj fariĝis taŭga por ŝipoj

kun pli ol dek mil toneloj. Tie oni jam plibonigis la kvar malnovajn kajojn kaj konstruis kvin novajn kun profunda akvo. Nun ili kune longas je 1 400 metroj. Aperis ankaŭ multaj staploj. Naŭ dekonoj de la varoj nun estas en- kaj elŝipigataj per maŝinoj. En 1981 en tiu haveno oni en- kaj elŝipigis 7 260 000 tunojn da varoj, t.e. 18-oble pli ol en la unuaj jaroj post la naskiĝo de la nova Ĉinio.

La haveno Huangpu konsistas el du partoj nova kaj malnova. La nova haveno kompare moderna, ekkonstruita en 1973, estas kvin kilometrojn de la malnova. Ĉar ĝi ankoraŭ estas en konstruado, ĝiaj en- kaj elŝipigitaj varoj atingis nur 5 850 000 tunojn en 1981.

La sekvan tagon mi vizitis la novan havenon. Sur la kajoj gigantaj grupoj ŝvingis siajn brakojn, ŝarĝaŭtoj portis la varojn elŝipigitajn al la staploj, kie streĉe laboras diversaj maŝinoj. La importitaj materialoj estas senĉese transportataj al Kantono kaj aliaj lokoj kaj eksportaj materialoj estas enŝipigataj ĉi tie por esti portitaj al aliaj landoj.

Mia vojqvidisto diris, ke por kontentigi la bezonon de la disvolviĝantaj eksteraj komercoj oni konstruis tie kvin kajojn por 20 000-tonelaj ŝipoj. Dume alia kajo aparte por kontenerŝipoj finkonstruiĝos en la fino de 1982. Ĉi tiuj ses kune longas pli ol mil metrojn. Krome oni finkonstruis kajon por petrolŝipoj, fervojan stacion kaj 14-kilometran fervojon.



En la nova haveno estas staploj de 150 000 kvadrataj metroj, kiuj povas enteni 300 000 tunojn da materialoj. Tie laboras 70 grandaj kaj malgrandaj ŝarĝiloj. Krome la haveno estas ekipita



Parto de
la haveno

Kondukistino





Transportado de konteneroj




Loĝkvartalo en la haveno

Fremdlanda pasaĝera ŝipo atingis la havenon.



XU WEIMIN:

Centjara bazaro de la Urbodia Templo



La Naŭ-kurbiĝa Ponto

EN Sanhajo troviĝas la Bazaro Yuyuan, kiu travivis jam pli ol cent jarojn. Tie troviĝas ankaŭ la templo de la Urba Dio, pro kio oni kutimiĝis nomi ĉi tiun apartan bazaron la Bazaro de la Urbodia Templo.

Antaŭe la templon frekventis piuloj. Sed nun oni ne plu vidas tie la scenon de incensado kaj preĝado. Nun ĉiutage dekmiloj da homoj venas al la templo por tute alia celo: Ĉe ĝi estas fama Naŭ-kurbiĝa Ponto kaj Yuyuanĝardeno, kaj ankaŭ proprastilaj butikoj, de kiuj oni povas aĉeti objektojn aŭ manĝaĵojn neakireblajn en aliaj lokoj de la urbo.

“ARTA TREZOREJO”

Trairinte la pordon gardatan de paro da ŝtonaj leonoj, oni vidas antaŭ si grandan halon de la Urbodia Templo. Nun la halo servas kiel butikoj de metiartaĵoj. Irante en la longan koridoron de

la halo, oni sentas sin kvazaŭ en trezorejo. Belaj palacaj lanternoj alte pendas sub la plafono kaj la diversaj metiartaĵoj rebrilas en montrofenestro, logante la venintojn.

Jen la porcelana avo-triopo Feliĉulo, Altrangulo kaj Longvivulo produktita de la ĉina ceramika centro Jindezhen, kaj la pejzaĝaj mozaikoj el konkaj estas karakterizaj produktaĵoj de la marborda urbo Qindao de Shandong-provinco, kaj la brilantaj broĉoj, kolieroj, fingroringoj, orependaĵoj kaj aliaj garnaĵoj estas lokaj.

Aparte allogaj estas broĉoj brilantaj: Broĉoj grandaj kaj malgrandaj, unudiamantaj kaj plurdiamantaj, kristalkoloraj kaj buntaj. Kian oni volas, tian oni certe trovos. La broĉoj estas en diversaj formoj, aŭ en formo de pavo, papilio, aŭ en formo de krizantemo, umefloro, vinbera grapolo aŭ banano.

En la butikoj oni vidas ankaŭ tre delikatan kason el lako, trinkilarojn el purpura argilo produktitajn de la ĉina fajenca centro Yixing en Jiangsu-provinco, lignoskulptitajn objektojn el Zhejiang-provinco, eburajn skulptaĵojn el Tianjin, silkajn murtapiŝojn el Hangzhou, broditajn litkovrilojn el Hunan-provinco k.a. Eble neniu kredas, ke en tiu butikoj oni vendas 2 600 specojn de varoj.


MALGRANDAJ BEZONAĴOJ

La plej evidenta karakterizaĵo de la vendaĵoj de la bazaro Yuyuan estas tio, ke la varoj estas malgrandaj kaj lokaj.

En la bazaro estas pli ol cent grandaj kaj malgrandaj butikoj, kies varoj nombras pli ol dek mil specojn. Multaj butikoj havas sian propran guston. Ekzemple la Butiko de Tondiloj kaj Tranĉiloj Wangdalong estas fama pro siaj akraj kaj longeuzablaj pro-



Butiko de ornamaĵoj en la bazaro Yuyuan



duktaĵoj. La butiko liveras diversajn tranĉilojn kaj tondilojn de pli ol 300 specoj por popola uzo, por industrio, arbokulturo, brutobredado, medicino, metioj kaj scienca esplorado.

Ankaŭ butono estas karakteriza varo de la bazaro. En la Butonbutiko Hongguang oni liveras butonojn de pli ol 600 specoj el bakelito, celulojdo, veluro, galvanizita plasto kaj vitra diamanto. Kaj tiuj butonoj portas ĉiajn okulplaĉajn kolorojn de la naturo. Cetere tie la butonoj havas diversajn grandecojn de 8 ĝis 32 milimetroj. Oni ofte povas vidi, ke iu venas al la butiko, kunportante pecon da ŝtofo, por havigi al si butonojn samkolorajn kiel la ŝtofo, aŭ iu alia, perdinta butonon de sia vesto, venas aĉetitanovan.

Oni povas aŭdi tian diron: "Objekton netroveblan en la Bazaro Yuyuan, oni ne trovos aliloke."

BUTIKO DE BESTOJ

En la bazaro estas bestobutiko tre ŝatata de infanoj. Oni ofte

povas vidi knabojn starantajn antaŭ la montrofenestro de la butiko kaj parolantajn kun la bestoj.

La butiko malgranda dividiĝas en du ĉambrojn. En la norda ĉambro estas vico da akvarioj por orfiŝoj. Ĉe la murpiedo estas kaĝoj entenantaj kolombojn, kuniklojn, blankajn musojn, kobajojn kaj paserojn. Tiuj bestoj estas por eksperimentado, sed iuj aĉetas ilin simple por siaj infanoj.

La sudan ĉambron okupas simioj. Ili altas nur 30 centimetrojn aŭ iom pli. La brunaj haroj, palruĝa vizaĝo, la palpebrumado, ĉio formas interesan figuron. Kvankam ili estas ligitaj per ĉeno ĉe la kolo, ili tamen estas tre moviĝemaj.

La butiko vendas ankaŭ serpentojn, kameleonojn, testudojn, bufojn k.a. por medicina uzo. Tiuj bestoj estas ofte uzataj kiel drogoj en receptoj de la ĉina tradicia medicino.

La butiko vendas vivajn serpentojn venenajn kaj senvene-

najn. Aspekte ili estas tre timigaj, sed efektive tre utilaj por kuraci iujn malsanojn. Ekzemple la galveziko de serpento estas uzata por kuraci reŭmatismom. Kaj krome la viando de serpento estas tre delikata kaj bongusta.

PROPRAGUSTAJ MANGAĴOJ

Trabutikante en la bazaro, oni povas flari tre plaĉajn odorojn de manĝaĵoj kaj kukaĵoj.

La tieaj manĝaĵoj famas pro siaj plaĉaj koloro,odoro kaj gusto. Preskaŭ ĉiu restoracio proponas apartajn gustojn, ekzemple la farunan bulon de la restoracio Guihuating, la okgustan rizajon de la restoracio Man-yuanchun, la kukojn de la restoracio Songyunlou k.a.

Tiuj frandaĵoj plaĉas al homoj per siaj zorga farado kaj materialoj. Prenu ekzemple la farunan bulon. La farado de tiu manĝaĵo estas tre interesa: unue rosti fajnan sukeron en viskozajn grajnoj, poste ruladi ilin en faruno ĝis la grajnoj havas la



La butiko Wanli de apogbastonoj



Preparado de farĉita farunaĵo

grandecon de kolombovo, kaj fine kuiru ilin en akvo. La fragila kuko estas farita el bambuĝermo, fungo k.a. tranĉitaj en tre maldikaj strioj.

La manĝaĵoj de la bazaro tre varias laŭ la sezonoj. En printempo oni povas frandi rizkampajn helikojn peklitajn per bran-

dorekremento. En somero oni povas ĝui "kvadratan" aŭ mentan kuketon. En aŭtuno, kiam kraboj estas plej viandaj, oni povas regali sin ĉi tie per krabovianda pastaĵo vaporumita.

Se iu volas regali siajn amikojn per bankedo, la kuiristoj de la restoracioj faras tiucele

diversformajn kukaĵojn, ekzemple hundon, simion aŭ akvome lonon kaj persikon. Tiuj kukaĵoj estas ne nur bongustaĵoj, sed ankaŭ belaj artaĵoj. Iuj eksterlandaj turistoj preferas porti ilin hejmen kiel memoraĵojn aŭ donacojn al siaj amikoj ol formanĝi ilin.

KONKURSO PRI JUBILEA AFIŜO

LIGE kun la jubileo de Esperanto en 1987 UEA lanĉas konkurson pri nova afiŝo, ĝenerale utiligebla en klubejoj, publikaj lokoj, budoj ktp. Se tiu nova afiŝo estos sufiĉe alloga kaj konvinka, sendube multe pligrandiĝos la nombro de simpatiantoj al Esperanto.

ENHAVO: La afiŝo celu vekti la intereson de iu, kiu neniam aŭ apenaŭ aŭdis pri Esperanto. Eventuale ĝi povus enhavi spacon por adresoj.

TEKNIKAJ DETALOJ: La afiŝo povus esti unu- aŭ plur-kolora. Ne

estas apartaj limigoj pri grandeco. La grafikaj elementoj devus esti jam pretaj, do UEA ne povas akcepti ideojn, kiuj postulas ankoraŭ detalan teknikan prilaboron. Tio signifas, ke esperantisto deziranta partopreni la konkurson prefere petu la helpon de neesperantista grafikisto, se tio necesas. Oni ankaŭ povas instigi neesperantistan artiston rekte partopreni.


PREMIO: La plej bona afiŝo estos eldonita de UEA, kaj la gaj-

ninto ricevos premion de 1 000 nederlandaj guldenoj en fiksdata deponeo ĉe UEA je jara rento de 6%. (Kompreneble la gajninto ankaŭ rajtas tuj ricevi la monon.) UEA rezervas al si la rajton ne aljuĝi la premion.

ADRESO KAJ LIMDATO: Sendu konkursaĵojn al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Ili devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de decembro 1982.

JIA YAN kaj ZHEN MING:

Florado de Arto



EN la frua printempo ĉi-jare oni unuafoje okazigis en Pekino Ekspozicion de Verkoj de Ĉinaj Nacimalplimultoj en la Kultura Palaco de la Naciecoj. En ĝi estis eksponataj 379 verkoj de 282 pentristoj el 50 nacimalplimultoj. Per forta nacieca stilo kaj loka gusto la ekspoziciaĵoj multflanke spegulis la vivon de diversaj naciecoj. La tuta ekspozicio montris la fakton, ke post la fondiĝo de la nova Ĉinio prosperas la belarto de la ĉinaj nacimalplimultoj kaj rapide progresas iliaj pentristoj.

Arto estas sendito, kiu ligas la korojn de la rigardantoj. La ekspoziciita tibeta pentraĵo "Princo Gesar" estas unu el la verkoj laŭdataj de rigardantoj. La pentraĵo ĉerpis materialon el la epopeo "La Biografio de Princo Gesar", kiu cirkulas inter la tibetanoj. Per lerte konceptita dispozicio la pentristo lokis en la mezo de la pentraĵo la figuron de Princo Gesar, heroo en la koro de la tibetanoj, kiu estas ĉirkaŭita de 18 bildoj pri lia vivo, kiel "La Naskiĝo de la Heroo", "Surtroniĝo Pere de Ĉevalkonkurso", "Subigi Demonon en la Nordo" ktp. En la malsupra parto de la pentraĵo prezentiĝas sceno, kiel la tibeta popolo karmemoras kaj amas lin. La ĉefa parto de la tuta verko estas distingiga, ĝia stilo delikata kaj ĝia koloro ĉarma.

La pentraĵo "Princo Gesar" estas kune farita de kvin tibetaj pentristoj el la Tibeta Aŭtonoma Subregiono Garze kaj tri hanaj pentristoj. En 1964 la tibetaj pentristoj Rinchenlangjia, Nima-zeren kaj Yixizeren diplomitiĝis el la Belarta Instituto de Sichuan kaj revenis hejmloken. Ili okupiĝis en la Kultura Domo de sia hejmloko pri popularigo de la belarto kaj pri kolektado, ordigado kaj studado de la popola belarto. Dawa estas pentristo deveninta de tibeta kamparano, okupiĝis pli ol dudek jarojn pri pentrado kaj bone posedas la tradician tibetan pentroarton. Yixisangdan fariĝis pentristo post memlernado. La tri hanaj pentristoj estas junuloj, kiuj post sia diplomitiĝo el altlernejo volis veni en Tibeton por fari laboron pri ĝia nacia kulturo. Por vive krei la figuron de Princo Gesar ili foje refoje rigardis la tibetan teatraĵojn, studis lignogravuraĵojn de la tibetaj sutroj kaj religiajn skulptaĵojn por koni la stilon de la popola arto de tibetanoj kaj la interesiĝon de la tibetanoj pri belarto.

Alia elstara verko en la ekspozicio estis la olepentraĵo "Bonvenigo al Novedzino". La aŭtoro E Guijun estas amatora pentristo de la nacieco tu. De sia infaneco li amas pentradon, diligente memlernas fari ĉinstilajn pentraĵojn, olepentraĵojn kaj

lignogravuraĵojn kaj samtempe, profitante la okazon de laboro, profundigas en la vivon. Li loĝas en la gubernio Minhe, provinco Qinghai, en la supra baseno de la Flava Rivero kaj bone konas la vivmanierojn de la tieaj tua kaj tibeta popoloj. Antaŭ la Liberiĝo la tua nacieco kaj la tibeta nacieco konservis ĉe si la malbonan feŭdan moron malestimi la virinojn. Post la Liberiĝo la popolamasoj mem forigis la malbonan moron kaj starigis novan moron. La pentraĵo "Bonvenigo al Novedzino" estis farita post kiam la aŭtoro vidis geedziĝan ceremonion de gejunuloj en Tibeto kaj sekve de tio ekpensis pri la mizera sorto de la tibetaj virinoj en la malnova socio. La pentraĵo montras aron da tibetaj gejunuloj rajdantaj surĉevalo, kiuj kolektiĝas ĉirkaŭ bela novedzino ankaŭ surdorse de ĉevalo, dum ŝi ŝajnas mediti kaj sur ŝia vizaĝo montriĝas ĝojo. La pentraĵo pri unu el la scenoj de la vivo vivovere surpaperigis la karakteron de homo, temperamenton de la nacieco kaj la gajan atmosferon sur la stepo, kio kune rezultigis efikon vivecplenan kaj kortuŝan. La pentrostilo de la aŭtoro estas modesta sed riĉa je vivetosoj. Pro la sama kialo ankaŭ lia lignogravuraĵo "Printempo en Gobi" estis bone akceptita de rigardantoj en la Sesa Ekspozicio de Ĉinaj Lignogravuraĵoj kaj la Ekspozicio de Ĉinaj Lignogravuraĵoj el la Pasintaj 40 jaroj, kiu estis okazigita en Japanio kaj Francio.

La serio da lignogravuraĵoj "Hura! Karavano" estas verko de Li Xiu, lignogravuristino de yi-nacieco. Kun plena entuziasmo kaj per kvar lignogravuraĵoj "Lumbriloj sur Lago", "Rivervalo", "Kampfajro" kaj "Eĥo",

ŝi priskribis la malfacilan sed poezian vivon de karavano, kiu tutjare transportas ĉiutagajn necesajojn al la yi-nacieca popolo. La lignogravuraĵo "Eĥo" prezentas scenon, en kiu antaŭ vilaĝo loĝata de yi-oj sterniĝas oraj rizkampoj kaj la vilaĝanoj rikoltas rizon, kio tiel ĝojigas la karavananojn, ke ili ekludas muzikilon. Vidante la karavanon transportantan ĉiutagajn necesajojn kelkaj yi-oj ĝoje ekkrias: "Hura! karavano!"

La ĉinstilaj pentraĵoj "En Kvietan Nokto" kaj "Ruĝa Saliko" spegulas la profundan amikecon inter la Ruĝa Armeo kaj popolanoj de la dong-a kaj mongola naciecoj en la malfacilaj jaroj de la revolucia batalo de la ĉina popolo. La pentraĵo "Ruĝa Saliko" estas verkita de juna mongola pentristo Hairhan, filo de paŝtisto sur la stepo Ke-erqin en Interna Mongolio. De sia lernado en mezlernejo li ekamis pentri. Post ekzameno en 1977 li eniris en la artan fakultaton de la Centra Instituto por Nacimalplimulto. Post kvarjara lernado li rimarkinde progresis en pentrado kaj kreis sian reprezentantan verkon "Ruĝa Saliko" ĉe sia diplomitiĝo. Somere 1981 li revenis hejmloken por kolekti materialon por pentri. Lin profunde impresis sceno, en kiu en kvietan nokton surstepo apud kampfajro mongola maljunulo rakontis pri la historio de la revolucia batalo, ludante ĉevalkapan muzikilon. La pentraĵo "Ruĝa Saliko" prenas la kvietan stepon kiel fonon kaj prezentas scenon, en kiu mongola maljunulo intime parolas kun soldato de la Ruĝa Armeo apud flaman-ta kampfajro.

Krome, profundan poezion havas la skulptaĵo "Lernanteto" de la huj-nacieca skulptisto Ma Ali,

la olepentraĵo "Avino" de la kore-nacieca pentristo Jin Rilong, "La Monto Gelao en Aŭtuna Nokto" de la gelao-nacieca pentristo Xie Xinrong kaj la olepentraĵo "Trinkado de Buterteo" de la uzbeka pentristino Munawa. Plezurigante la rigardantojn per beleco, la pentraĵoj profundigas ilian konon pri tiuj naciecoj.

Ĉinio estas unueca multnacieca lando. Pro historiaj kialoj la naciecoj evoluis malegale en ekonomio kaj kulturo. Dum longa tempo antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio iuj malproksimaj limregionoj kaj naciecoj malmulte nombrantaj troviĝis en primitiva socia stato. La tieaj loĝantoj vivis de plukado, ĉasado kaj terkulturado per simplaj produktiloj. Ili ne havis skriblingvojn nek intelektulojn, por ne paroli pri pentristoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la popola registaro praktikis politikon de egalrajteco inter ĉiuj naciecoj. Disvolvante la ekonomion de la nacimalplimulto, la ŝtato faris grandan klopodon por kulturaj laborantoj pri kulturo kaj arto de nacimalplimulto. En la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio estis starigitaj nacimalplimultaj institutoj, artaj institutoj aŭ fakultatoj en Pekino, kelkaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj por kulturaj artistoj de nacimalplimulto. Belartaj institutoj en lokoj loĝataj de hanoj aldonis al si kurson por nacimalplimultaj studentoj. En ĉiuj aŭtonomaj subregionoj, gubernioj kaj komunumoj oni starigis kulturajn domojn, regule funkciigas kursojn pri belarto por amantoj de belartoj, okazigas ekspoziciojn de belartaj verkoj kaj kunsidojn pri popolarto de nacimalplimulto, kio akcelas la disvolviĝon de la belarto en la nacimalplimultaj regionoj.



"Bonvenigo al Novedzino"
(Olepentraĵo)

de E GUIJUN



"Avino" (Olepentraĵo)
de JIN RILONG

ŜAJNIS al mi, ke mi venis en la fabelan mondon, kiam mi iris en la eksponejon de la Huishan-a Argil-homfigura Fabriko de Wuxi. Tie, sub milda lamplumo videblas vivoveraj argilaj homfiguroj, sennombraj kaj diversspozaj.

Rimarkinte ke mi absorbiĝas en rigardado de la eksponaĵoj, mia akompananto Zhu Quangen, teknikisto de la fabriko, demandis: "Ankaŭ al vi plaĉas niaj argilajoj, ĉu ne?" Mi respondis: "Krom ne povi paroli, tiuj argilajoj estas vivoveraj." Montrante al paro da dikaj pupoj, li klarigis al mi, ke ili estas "Dikaj Feliĉuloj" faritaj laŭ la ĉina mitologio, la reprezentanta verko de la fabriko. Legendo diras, ke antaŭ longe dense kreskis savaĝaj herboj kaj arboj sur Huishan-monto, tie sin kaŝis iu rabobesto "Ta" pli feroce ol leono. Ĝi kaŭzis sennombrajn malfeliĉojn al la loĝantoj proksimaj. Post nelonge naskiĝis paro da geviraj ĝemeloj, tre fortaj kaj lertaj en batalo. Fine ili kaptis la rabobeston kaj ĝin mortigis. Poste, memore al ili la tieaj popolaj artistoj modlis per argilo la figurojn de la geviraj ĝemeloj kaj nomis ilin "Feliĉuloj". Samtempe ili esperis, ke iliaj infanoj kunportos feliĉon al la homaro kiel tiuj du Feliĉuloj, kiam ili plenkreskiĝos. Tiuj argilaj pupoj estas aparte plaĉaj pro siaj profunda signifo kaj belaj figuroj.

"La farado de Huishan-aj argilaj homfiguroj havis historion jam de pli ol 400 jaroj. Ĝi estas unu el la floroj en la ĝardeno de la popola arto en Ĉinio. La nomita fabriko fondiĝis en 1954, kaj nun la nombro de ĝiaj laborantoj jam kreskis de 100 al 580," konigis al mi Zhu Quangen kaj kondukis min al ĉiu la-

ZHANG QINGZHEN:

Vizito al la Huishan-a Argil-homfigura Fabriko de Wuxi

borejo. La vizitado impresis min kvazaŭ mi estus en la "Liliputo" en "Vojaĝo de Gulihero" verkita de la angla verkisto Tonathan Swift. La malgrandaj argilaj figuroj altas nur kelkajn colojn. Tamen inter ili troviĝas figuroj kaj modestaj kaj groteskaj kaj sveltaj kaj grav-mienaj. Rigardante mi sentis ke tiuj argilajoj ĉiuj animiĝis. Ili havas riĉan senton kaj povas paroli. Ili elverŝas koron ne per la buŝo sed per la mieno kaj pozo.

Zhu Quangen ja meritas sian oficon de teknikisto. Li torente rakontis al mi, ke la permana farado de argilaj homfiguroj unue aperis en Ming-dinastio (1368-1644 p.K.). Tiam, agrikulturo estis prospera sude de Jangzi-rivero kaj la popola vivo estis trankvila. Tien kuris multaj vizitantoj kaj pilgrimantoj. Ili ĉiuj volis kunporti hejmen iajn objektojn simbolantajn bonan aŭguron kiel memoraĵojn. Por kontentigi la vizitantojn oni komencis fari argilajn modlaĵojn, kiel longvivulo, Avalokitesvaro ktp. La koto ĉe la montpiedo de Huishan karakteriziĝas per elasteco kaj delikateco. Ne kreviĝas la sekaj produktoj el kneditaj kotaĵoj. Nun, la tieaj argilaj modlaĵoj estas ĝenerale klasifikitaj en du kategoriojn: la unuaj estas modlitaj ludiloj por infanoj, ekz. simplaj, vivecaj kaj bril-koloraj Feliĉuloj, kokoj, katoj ktp., la aliaj modli-

taj homfiguroj ĉefe el operoj, popolrakontoj kaj mitoj, ekz. "Ok Feoj Transiras la Maron", "Benoplana Feino Magu" kaj "Belulino Chang'e Flugas al la Luno" ktp., kiuj estas tre plaĉaj pro siaj belaj figuroj kaj brilaj koloroj.

La 0.33 metron alta modlaĵo "Benoplana Feino Magu" estas vere admirinda. Magu estas feino en la ĉina mitologio. La modlaĵo prezentas ke ŝi kun la donacaĵoj en la manoj iras al la Okcidenta Ĉielo por beni la plej altan diĉnon, Xiwangmu. Ŝajnas, ke la eleganta kaj svelta feino Magu iras al la rigardantoj, tenante persikojn simbolantaj longan vivon. Ŝiaj vestbaskoj kaj jupo flirtas en zefiro. Ŝiaj okuloj radias. Viveca kaj kortuŝa estas la figuro. La modlaĵo simbolas benon al homoj pri longa vivo kaj havas tre altan valoron.

Mi estis tute ravita de la eksponitaĵoj kaj elkore admiris ne nur la modlaĵojn sed ankaŭ la talenton de la artistoj. Kiom da penado ili faris por tiuj artaĵoj! Ŝajnas, ke Zhu Quangen malkovris mian sekreton. Li diris: "Kvankam argila homfiguro altas nur kelkajn colojn, tamen estas bezonataj dekelkaj tagoj por ĝin kolorigi!"

La Huishan-aj argilaj homfiguroj estas faritaj el argilo kaj per pentrado kaj precipe dank' al la lertaj manoj de la artistoj. La maljuna artisto Chen Axing



“Feliĉuloj”



Majstroj kaj metilernantoj

prezentis al mi la faradon de operaj herooj. Li ne bezonis modlilon nek imitaĵojn. Mi vidis, ke li metis gluecan, nigran argilon sur stablon, kaj post frapado, premado kaj knedado aperis antaŭ ni la animplena homfiguro. Sekve, alia artisto ĝin kolorigis kaj faris por ĝi la vizaĝon. Per simpla desegnado li klare modlis la homan trajton.

La 82-jara maljuna artisto Chen eklernis la arton jam de sia infaneco kaj okupas pri ĝi jam 70 jarojn. En la longa laborado li formis sian originalan stilon. Precipe en fabrikado de vizaĝfiguroj el Pekina opero, li ĝuas tre altan prestiĝon inter siaj kolegoj.

Modlado de argilaj homfiguroj estas la tradicia arto de la fabriko. La mienoj de la figuroj estas versimilaj, la linioj de iliaj vestoj taŭgas por rigardo. Estas viglaj precipe la mienoj kaj movoj de la homfiguroj faritaj laŭ apartaj intrigoj en dramo. Vizitante Usonon gvidanto de nia lando, kamarado Deng Xiaoping kunportis 80 kompletojn da argilaj vizaĝfiguroj de Pekina opero kiel donacon al Usono.


En la fabriko, troviĝas tri perfektaj artistoj, kiel Chen

Axing. Dum longaj jaroj ili elkulturis multe da artistoj. Iuj el ili fariĝis elitoj ĉirilate. Ma Jingjuan, la metilernantino de Chen, ja estas unu el la junaj eminentaj artistoj de la fabriko.

Pli-ol-30-jara Ma Jingjuan estas bela kaj svelta. Nun ŝi estas estro de la grupo pri knedado de dramaj vizaĝfiguroj. Kiam mi vizitis ŝin, ŝi estis faranta grupon da operaj homfiguroj. Ŝi absorbiĝis en sia laboro kaj rapide prilaboris la argilon per siaj lertaj manoj, kaj nur post 10 minutoj, iu gracia bela modelo de heroino vivece stariĝis sur ŝia manplato. Tamen en la komenco ŝi apenaŭ ĉesigis sian lernadon. Ŝi diris al mi, ke ŝi eklaboris en tiu ĉi fabriko en 1969. En la komenco ĉiutage ŝi sidis apud la majstro, atente rigardis lian laboron kaj aŭskultis lian klarigadon. Dum la rigardado kaj aŭskultado ŝi sentis ke la laboro estas simpla. Ŝin ektiklis persona provado por manifesti sian talenton antaŭ sia majstro. Tamen ŝia provado malsukcesis tuj ĉe la komenco. Tiam, ŝi misopiniis, ke la majstro ne instruis al ŝi ion gravan aŭ ne bone klarigis. Ŝi malkaŝis sian penson. Aŭdinte tion, Chen

Axing ekridis ĝis larmoj, dirante: “Kie estas la spertaĵo? Por okupiĝi pri arta kreado, krom riĉa sperto en la vivo oni nepre devas havi lertajn manojn. Por atingi tion unu aŭ du monatoj ne sufiĉas. Male, por krei sian stilon en la laboro oni devas multe cerbumi kaj multe ekzerci sin en praktikado.” Ŝi gravuris tiujn vortojn en la memoron. De tiam ŝi de mateno ĝis vespero ekzercis sin per modlado de argilaĵoj kaj ofte turnis sin al la majstro kun diversaj problemoj pri tekniko por humile lerni de li. Post du jaroj ŝi lerte posedis la teknikon kaj povis elfari ĉiajn figurojn, kiuj impresas kiel veraj objektoj. Mi spektis grandan nombron da ŝiaj produktaĵoj kaj trovis ilin distingiĝaj per sia originaleco. La dramaj homfiguroj estas vivecaj, kun okuloj brile radiantaj.

Ĝojigis min tio, ke la fabrikado de argilaj homfiguroj, kiel popolaro subtaksata en la malnova socio, havas ne nur pluan disvolviĝon, sed ankaŭ brilan perspektivon. Karaj amikoj, mi esperas, ke vi ne perdos la ŝancon rigardi la fabrikon, se vi iam vizitos Wuxi, ĉar tio donos al vi veran ĝuon de beleco.



Vidindaj lokoj

de

Shandong

de XUESHENG



EN Shandong-provinco, kiu situas en la orienta parto de Ĉinio, estas nemalmultaj vidindaj lokoj. Ĉi tie mi koncize prezentas kelkajn el ili, kies fotoj aperas sur la koloraj bildpaĝoj de ĉi tiu numero.

PENGLAI — FEA LANDO

La pavilono Penglai staras sur la montsupro de Danya norde de la guberniurbo Penglai. Ĝi supre skrapas la bluan ĉielon kaj malsupren rigardas al la maro Bohai, aspektante kiel jada palaco pendanta inter la ĉielo kaj maro. En la antikva ĉina mitaro

ĝi estis priskribita kiel loko loĝata de feoj.


La pavilonon ĉirkaŭas ses grupoj da antikvaj konstruaĵoj de malsamaj stiloj, kiuj estas dissemnitaj sur altaj kaj malaltaj montodeklivoj. La tuta konstruajaro kun totala plankareo de 18 900 kvadrataj metroj okupas areon de 328 000 kvadrataj metroj. La ĉefa pavilono konstruiĝis en la komenco de la 11-a jarcento kaj estis plurfoje riparita kaj disvastigita. Ĝi estas ligna konstruaĵo kun du etaĝoj kaj frontas kontraŭ la sudo. Ĝi distingiĝas per traboj kun gravuraĵoj kaj kolonoj kun pentraĵoj. En la teretaĝo staras 16 ruĝaj kolonoj kaj la duan etaĝon ĉirkaŭas delikata koridoro, de kie turistoj povas ĉirkaŭpreni per unu rigardo la malproksimajn montojn kaj proksimajn maron, kampojn kaj citadelon.

La plej ĉarma pejzaĝo de Penglai estas miraĝo. Inter printempo kaj somero aŭ en la fino de somero kaj la komenco de

aŭtuno, kiam leviĝas orienta vento post pluvo, foje aperas sur la horizonto mistera spektaklo, kiu aspektas iam kiel citadelo kun altaj domoj, iam kiel movplena strato, iam kiel verda kampo kun montoj kaj riveroj. La miraĝo aperinta je la 10-a de la pasinta julio daŭris pli ol 40 minutojn, kio multe plezurigis la turistojn.

Ĉe la orienta piedo de la monto Danya troviĝas surakva urbeto. Efektive ĝi estas ĉirkaŭmuro konstruita en golfo. Ĝi, 12 metrojn alta kaj 4 metrojn dika, havas perimetron de du kilometroj. Ponto interligas ĝiajn du pordojn nordan kaj sudan, ĉe kiuj instaliĝis fuortoĵ. La baseno interne de la ĉirkaŭmuro nomiĝas la Malgranda Maro, kiu servas kiel doko kaj ŝipkonstruejo. La ĉirkaŭmuro estis konstruita en Song-dinastio (960-1279 p.K.) kaj disvastigita en Ming-dinastio (1368-1644 p.K.). Ĝi estas unu el la plej malnovaj bazoj de la ĉina mararmeo.

Daming-lago



En la 16-a jarcento la fama ĉina nacia heroo Qi Jiguang tie gardis kontraŭ la eksterlandaj agresantoj.

LA LAGO DAMING

Jinan, la ĉefurbo de Shandong, estas antikva urbo, kiu havas historion de 2 600 jaroj. En siaj vojaĝnotoj la itala vojaĝisto Marko Polo en la 13-a jarcento skribis, ke “ĝi plezurigas per siaj belaj ĝardenoj”. Ĉar ĝi abundas je fontoj, ĝi ĝuas la nomon “Fonta Urbo”. Granda parto de la pli ol cent fontoj en la urbo kunfluas en la lagon Daming.

La lago kun areo de 46 hektaroj troviĝas en la nordorienta parto de la urbo. Frue en Song-dinastio oni konstruis tie pavilonojn, pontojn, kioskojn kaj digojn, tiel ke ĝi fariĝis vidinda loko. Poste la loko servis kiel parko, kiu havas nun areon de 80 hektaroj kaj portas la nomon de la lago.

La suda pordo de la parko estas bela arkado. Tra la arkado oni tuj vidas la lagon Daming. Sur la zigzaga bordo de la lago lokiĝas historiaj restaĵoj kiel la ĝardeno Xiayuan ĉirkaŭita per koridoro. La kvietan ĝardenon oni ornamis per artefaritaj montoj, surakvaj kioskoj, zigzagaj pontetoj kaj koridoroj. Tie estas la templo Jiakuan konstruita por memori Xin Qiji (1140-1207 p. K.), grandan poeton de la Suda Song-dinastio naskiĝintan en Jinan. En la parko estas ankaŭ la templo Beiji laŭ taoisma stilo. Starante sur ĝi oni povas ĝui la panoramon de la lago kaj pejzaĝon de la montaro en la suda antaŭurbo.

En vasta lago punktiĝas verdaj insuletoj, kiujn oni povas atingi per belaj boatoj. Sur la plej granda el ili estas la

kiosko Lixia k.a. Ĝi konstruiĝis en la periodo de la Norda Wei-dinastio inter la 4-a kaj 6-a jarcentoj kaj la nuna okangula kiosko estis rekonstruita en 1860. En 745 p. K. Du Fu, la granda poeto de Tang-dinastio, kaj la fama pentristo kaj kaligrafo Li Yong tie improvizis poemojn. Postaj poetoj kaj kaligrafoj ilin imitis kaj iris tien fari la samon, tiel ke la kiosko famiĝis tra la lando. La skribajo “Kiosko Lixia” de imperiestro Qianlong de Qing-dinastio gravurita sur ŝtono kaj ligno bone konserviĝas eĉ nun sur la insulo.

ANTI-KVA TEMPLO EN LA PROFUNDA MONTARO


La templo Lingyan ĉe la norda piedo de la monto Taishan estas unu el la plej famaj antikvaj temploj de Tang-dinastio. Legendo diras, ke bonzo Lang Gong vojaĝis al la loko. Vidinte, ke tie ĉarmas pejzaĝoj, li konstruigis domojn por loĝi kaj prediki. Liaj aŭskultantoj ofte superis mil, kaj kiam li predikis plej bele, eĉ roko montris kon-

tenton per kapbalanco. Iu aŭskultanto informis Lang Gong pri tio kaj tiu diris: “Ne estas strange, ke ankaŭ la roko komprenas.” De tiam pli kaj pli vigliĝis tie la religiaj aferoj. En la Norda Wei-dinastio oni komencis konstrui templon kaj en Tang-dinastio en la 7-a jarcento ĝi jam havis pli ol 40 halojn kun 500 ĉambroj kaj la bonzoj superis 500.

La plej allogaj estas 40 koloraj argilaj arahatoj de Song-dinastio en la Milbudha Halo de la templo. Ili, altaj kiel veraj homoj, estas vicigitaj ĉe la piedoj de muro. Post mil jaroj la koloroj de la argilaĵoj restas same brilaj kiel antaŭe. La malsamaj pozoj, vestoj kaj mienoj de la arahatoj klare montras ilian devenon kaj personecon. La skulptado estas tiel eminenta, ke eĉ vejnoj kaj ostoj estas videblaj.

Okcidente de la Milbudha Halo estas la pagodo Bizhi, kiu havas originalan strukturon. La brika pagodo okangula estis konstruita en Song-dinastio. Ĝi kun alteco de 54 metroj havas naŭ etaĝojn, inter kiuj la unuaj

La tombo de Konfuceo



tri etaĝoj havas po duoblan tegmentrandon kaj la supraj ses etaĝoj unuoblan. La pagodo kun granda fera pinto, kies ok vertikale pendantaj ĉenoj ligiĝas kun la ok anguloj de la naŭa etaĝo, impresas impone kaj majeste.

LA PLEJ GRANDA ĜARDENO DE ĈINIO

En la Konfucea arbaro estas la tombejo de Konfuceo, la fama ĉina pensulo kaj edukisto en la 5-a jarcento a.K., kaj de liaj posteuloj. Post riparado kaj disvastigo fare de sinsekvaj dinastioj ĝi jam fariĝis la plej granda kaj plej malnova ĝardeno en Ĉinio.

Elirinte el la norda pordo de la urbo Qufu, la naskiĝloko de Konfuceo, laŭirinte unu-kilometran avenuon kaj preterpasinte unu arkadon kaj du kioskojn kun memorŝtono, oni atingas la arbaron. La arbaro kun areo de pli ol 200 hektaroj estas ĉirkaŭita per alta muro sep kilometrojn longa. Enirinte en la unuan pordon kun ruĝaj fostoj kaj verdategola tegmento oni tuj sin trovas en la ombroj de arboj. Laŭdire, en la ĝardeno kreskas pli ol 22 000 arboj de mil jaroj kaj 40 000 junaj arboj. En la densa arbaro elrigardas tegmentoj kaj suprenlevitaj tegmentrandoj de domoj, kioskoj, portaloj kaj aliaj konstruaĵoj.

Antaŭ la dua pordo de la ĝardeno murmuris la rivereto Zhushui, rigardata de antikve kiel "sankta rivero". Efektive ĝi estis nur akvodrena kanalo norde de Qufu en la antikveco. Oni diras ke ĝi estas la plej frua akvoutiliga konstruaĵo en norda Ĉinio.


Trapasinte la ponton super la rivereto, laŭirinte la vojon borderitan per ŝtonaj homoj kaj bestoj kaj preterpasinte grandan halon, oni atingas la tombon de Konfuceo. Oriente de la tombo estas tiu de Kong Li, la filo de Konfuceo, fronte al ĝi tiu de lia nepo Kong Ji, kaj okcidente de la tombo estas griza brika domo kun tri ĉambroj, kie siatempe gardis la tombon lia disĉiplo Zi Gong. Laŭ historiaj notoj, post la morto de Konfuceo liaj aliaj disĉiploj portis funebrajn vestojn dum tri jaroj, escepte de Zi

Gong kiu gardis la tombon dum ses jaroj. La profunda amikeco tiel vidiĝis inter Konfuceo kaj liaj disĉiploj.

En la densa arbaro lokiĝas nekalkuleblaj tomboj de idoj de Konfuceo. Antaŭ la tomboj de ĉiuj altranguloj staras po unu alta monumento kaj gardstaras majestaj ŝtonaj homoj kaj bestoj. En la ĝardeno estas steleoj el la dinastioj Tang, Song, Yuan, Ming kaj Qing kaj aliaj riĉaj historiaj objektoj, pro kio ĝi povas esti rigardata kiel granda muzeo.

Arahato en la templo Lingyan





Vidindaj Lokoj de Shandong

Fotoj de ZHOU DONGYUAN kaj DI XIANGHUA

La fea lando Penglai



La kiosko Lixia sur Daming-lago



En la Konfucea arbaro





La pagodo Bizhi en
la templo Lingyan

“Akvourbo” ĉe la
montpiedo de Danya



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ



Venecio

Foto de NINO CILEA
(Italio)

Pejzaĝoj de Motovun, Jugoslavio Foto de ALOJZ OREL (Jugoslavio)





Rememore al pioniro Joĉaŝien

de WENG ZHIYUN

EKZISTAS tiaj homoj, kiuj donas impreson neforgeseblan dum la tuta vivo, eĉ se oni nur iom kontaktas ilin.

Ekzistas tiaj personoj kun alta idealo, kiuj dediĉas sin al la efektivigo de sia celo tutanime kaj persiste dum la tuta vivo, se nur ili firme kredas ĝin.


Ja tia estis Joĉaŝien, unu el la pioniroj de la ĉina Esperanto-movado.

Joĉaŝien naskiĝis la 6-an de oktobro 1907 en Zhenhai-gubernio, Zhejiang-provinco. Iom pli ol 20-jara, li komencis lerni Esperanton. En 1929, en Hankou li kaj liaj amikoj iniciatis la Esperantistan Societon kaj fondis dimanĉan Esperanto-kurson. Tiam li laboris en la lernejo fondita de Ningbo-anoj kaj tiel ĝi fariĝis la naskiĝloko de la Esperanto-movado de Hankou. En 1930 la societo evoluis en la Esperantan Asocion de Hankou, kiu eldonis monatan revuon "Espero", funkciigis vesperan kurson kaj stariĝis ĥoron. Tiam diversaj E-aktivadoj estis faritaj en la lernejo. Por propagandi Esperanton li kaj alia esperantisto planis piediri tra la tuta lando en 1931. Ekdirinte de Hankou suden ili

atingis Kantonon, poste trairinte la provincojn Fujian kaj Zhejiang ili venis en Ŝanhajon. Ili entuziasme faris propagandon survoje en lernejoj, bibliotekoj, edukaj domoj por popolamasoj aŭ librejoj. Kaŭze de la invado fare de Japanio al nordorienta Ĉinio en la 18-a de septembro 1931, ili ĉesigis sian piediran vojaĝon.

Tiam en Ŝanhajo okupiĝis pri la Esperanto-movado Ĵelezo, Zhang Qicheng, C. Ŝaŭ, He Zengxi, Jaziko k.a., kiuj preparis por fondi la Ĉinan Proletan Esperantan Union (ĈPEU). Joĉaŝien partoprenis en la preparado. Nelonge poste la unio estis fondita. Por grandigi siajn fortojn kaj influon la unio funkciigis korespondan lernejon de Esperanto. En decembro 1932 oni okazigis Esperantan ekspozicion kaj fondis la revuon "La Mondo". En januaro 1933 fondiĝis la Ŝanhaja Esperantista Ligo.

Ekde tiam la Esperanto-movado en Ŝanhajo ricevis pli viglan disvolviĝon. Anstataŭ okupiĝi pri alia profesio, li dediĉis sian tutan energion al la movado. Por fari tion estis bezonataj granda kuraĝo kaj sufiĉa oferemo en tiamaj cirkonstancoj. Komence Joĉaŝien respondecis ĉefe pri la koresponda lernejo, kompilis lernomaterialon kaj korektis ekzercojn de lernantoj. Ne malpli ol mil homoj partoprenis en la lernado, kio forte puŝis la Esperanto-movadon de Ĉinio. Poste la lernejo funkciigis Esperantan kurson por klasĉambra instruado kaj la ligo starigis librejon de ĉinaj esperantanoj. Tiel li respondecis kaj pri la administrado de la ligo kaj pri distribuado de la revuo "La Mondo" kaj la laboro en la librejo. En tiu ĉi tempo li kompilis Esperantan sciencan broŝuron "Astronomio".



Skribajo farita de Guo Mojue en 1943 por Joĉaŝien

Ĝuste en tiu tempo mi komencis lerni Esperanton kaj konatiĝis kun Joĉaŝien. Mi prenis lian lekciadon kaj pere de lia rekomendo mi aliĝis al la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Mi por ĉiam memoros lian varman kaj honestan sintenon al junaj esperantistoj. Lia lojaleco al la Esperanto-movado kortuŝis la proksimajn kolegojn, tial la kamaradoj intime nomis lin kamarado ĈOĈA. En tiu tempo lia familio loĝis en malgranda ĉambro de la oficejo de SEL kaj laboris por Esperanto tage kaj nokte. Lia familio havis du infanojn. Li ricevis tre malmultan pagon de la ligo, kio tamen ĝojigis la tutan familion.

Tiam la Esperanto-movado de Ĉinio sin kombinis kun la movado de la ĉina revolucio. La unio estis fondita sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝi estis revolucia kultura organizaĵo paralela al la Ĉina Maldekstra Verkista Unio, la Ĉina Maldekstra Dramista Unio kaj la Ĉina Maldekstra Belartista Unio. Kaŭze de la pli serioza subfoso kaj persekutado de la Kuomintang registaro al la revoluciaj kulturaj organizaĵoj, la unio devis aktivi kiel subtera kultura organizaĵo, dum la Ŝanhaja Esperantista Ligo, kiel periferia organizaĵo de la unio, alte tenante la standardon de progreso, servis kiel la publika kultura organizaĵo ununura en Ŝanhajo. Kaj SEL fariĝis loko, kie kontaktiĝis kaj kunvenis progresemaĵoj, kleruloj, studentoj, oficistoj kaj revoluciuloj. Tio certe altiris al si la atenton de policejo de la fremdlanda koncesio kaj kuomintangaj spionoj, sed la lerta batalado de Joĉaŝien kaj liaj kamaradoj kaj lia delikata laborstilo malebligis al la malamiko havi ateston.

La evento de la 7-a de julio


1937 sonigis la klarionon al la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo. Tiam la unio preparis por celebri la kvindekan datrevenon de la naskiĝo de Esperanto. La 15-an de julio 1937 la unio okazigis kunvenon memore al la kvindeka datreveno de ĝia naskiĝo, kiun ĉeestis pli ol 300 esperantistoj. La kunveno alvokis, ke la esperantistoj de Ĉinio ekagu kaj jetu sin en la sanktan batalon kontraŭ Japanio. Tio estis kunveno de unuigo, kaj Joĉaŝien estis unu el ĝiaj organizantoj.

Aprile de 1938, sub la gvido de Zhou Enlai la fama ĉina verkisto Guo Moruo fondis la Trian Buroon sub la Politika Departemento, kiu respondecis pri la propaganda laboro de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La ĉefaj aktivuloj de la Ŝanhaja Esperantista Ligo Ĵelezo, Joĉaŝien, Jaziko, Sanio kaj aliaj laŭinvite aliĝis al la Tria Buroo kaj respondecis pri la Esperanta internacia propaganda laboro. Pro tio tre ĝojiĝis Joĉaŝien kaj jetis sin en la intensan laboron tutanime. Post kiam Ŝanhajo estis okupita de la japanaj agresantoj, ili reelonis la revuon "Ĉinio Hurlas". En la sekva jaro ili venis al Chongqing kaj iniciatis la duonmonatan gazeton "Heroldo de Ĉinio". Ĝi senprokraste raportis pri la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo, estis distribuata en pli ol 60 landoj kaj bone akceptita de esperantistoj tra la mondo. Samtempe kun tio, ili kompilis nemalmultajn Esperantajn broŝurojn por la internacia propagando. La famaj esperantistoj Venlo Fon, Eltunko kaj Honfan funkciigis Korespondan Esperanto-Lernejon, kompilis lernolibrojn kaj eldonis esperantajjn kaj vortarojn, kio antaŭenpuŝis la Esperanto-movadon

kune kun la redakcio de la gazeto.

Somere de 1940 la Tria Buroo sub la Politika Departemento reorganizigis en la Komisionon de la Kultura Laboro. La Esperanto-movado kiel antaŭe strikte ligiĝis kun la laboro de la komisiono, kaj estis starigita kompostejo por Esperanto. Ĉiuj ĉi laboroj estis nedisigeblaj de la penado de Joĉaŝien. Precipe la kompostejo por Esperanto, kiu estis starigita en tre malfacilaj cirkonstancoj, per si mem enkorpiĝis lian eksterordinaran laboron. Guo Moruo laŭdis lian talenton kaj penemon en laboro kaj invitis lin labori kiel kontisto por la Komisiono de la Kultura Laboro. Komence li hezitis pri tio, sed dank' al persvado de Zhou Enlai li prenis sur sin la laboron.

En la komenca tempo de la periodo de reciproka detenado en la Kontraŭjapana Rezistmilito la landinterno de Ĉinio konservis rilatojn kun Ŝanhajo, tial li povis doni monon al siaj familianoj en tiu urbo, sed poste ĉiuj rilatoj estis rompitaĵoj. Kiam li forlasis Ŝanhajon, lia edzino gravediĝis. Poste ŝi kun siaj gefiloj vivis mizere de sia laboro kaj la monhelpo de siaj parencoj dum la longa daŭro de la milito. Novembre de 1941 la japanaj ĝendarmoj traserĉis ŝian hejmon kaj arestis ŝin. Ĉar ili ne povis trovi ion por kulpigi ŝin, ili devis liberigi ŝin post kelkaj tagoj. En la unua duonjaro de 1944, pro malfaciloj en la vivo ŝi kaj ŝiaj gefiloj transloĝiĝis en loĝkvartalon de malriĉuloj en la suda parto de Ŝanhajo. Tiu malfavora situacio estis imagebla por Joĉaŝien. Pro tio li ĉagreniĝis kaj fariĝis silentema. Li tre malofte ridis. En mia memoro li ridis nur dufoje. La unua fojo okazis



La familio de Joĉaŝien antaŭ la sidejo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo en la komenco de la tridekaj jaroj

vespere de la 1-a de aprilo 1939, kiam ni ĝoje festis en korto la 1-an datrevenon de la fondiĝo de la buroo. Malgraŭ sia okupiteco, vicprezidanto de KPĈ Zhou Enlai kaj lia edzino Deng Yingchao venis ĉi tien de la urbo Chongqing pli ol 50 kilometrojn malproksime, por ĉeesti la kunvenon. Ili ambaŭ kun granda intereso rigardis programerojn. En la vespero Joĉaŝien suriris la scenejon kaj kantis Esperante. Poste li voĉlegis sian poemon en dialekto. Li arte kombinis la nomojn de iuj kolegoj de la Tria Buroo en versaĵojn, por inspiri batalvolon kaj prezenti la belan perspektivon. Estas bedaŭrinde, ke mi ne povas memori ĉiujn frazojn de la versaĵo. Restas en mia memoro nur la lasta frazo, en kiu troviĝas la du ideografiaĵoj En Lai. Aŭdinte tion, vicprezidanto Zhou surprizigis kaj ekridegis manklakante. Ankaŭ Joĉaŝien ekridegis sur la scenejo. Subite li ekkriis: “Vicprezidanto Zhou prezentu, ĉu bone?” En la tondra aplaŭdado

vicprezidanto Zhou suriris la scenejon kaj faris paroladon. Poste li svingis ambaŭ brakojn kaj direktis la rigardantojn por kanti kontraŭjapanan nacisavan kanton.

Kaj la alia fojo okazis en 1941. Informite, ke Meixin, la unua filo de Joĉaŝien, kune kun samideano de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, venis en la kontraŭjapanan bazlokon de norda Jiangsu kaj aliĝis al la Nova Kvara Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio, li ekĝojis. Ĉe la renkontiĝo kun siaj amikoj li fiere diris: “Mia filo aliĝis al la Nova Kvara Armeo!” Lia gaja voĉo sentigis, kvazaŭ ankaŭ li mem venus en la kontraŭjapanan bazlokon kune kun sia filo.

Sed bedaŭrinde, la peniga laboro, la malbona nutro kaj ĉagreno dum longa tempo pli kaj pli malbonigis lian sanstaton. La ĉiam malboniĝanta politika medio pli gravigis lian neŭrasteion. Antaŭ la venko de la

Kontraŭjapana Rezistmilito li informiĝis, ke januare de 1945 lia edzino kun sia unua filino Meisu venis en la revolucian bazlokon de centra Jiangsu. En 1946 ankaŭ li mem venis en la liberigitan regionon Huaiyin en Jiangsu. Tiam, kvankam la tuta familio kunvivis kaj li devus senti pro tio ĝojon, tamen lin turmentis la grava neŭrasteio. En septembro samjare li kune kun la trupo atingis Shandong kaj partoprenis en la laboro de la tiea redakcejo de la liberejo Xinhua. En 1947 Kuomintang lanĉis ĉiuf flankan enlandan militon kaj la reakciaj trupoj atakis ĉefe Shandong, tiel ke li kaj liaj edzino kaj filinoj devis transloĝiĝi kaj vivi en loko pli sekura. Tiam li ripozis pro malsano, sed samtempe laboris per Esperanto. Li esperantigis parton de la dokumentoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj verkojn de prezidanto Maŭ Zedong. Hodiaŭ mi ankoraŭ konservas la manuskripton de lia Esperanta tradukaĵo “Pri Popol-demokratia Diktaturo” verkita de prezidanto Maŭ. Tio montras, ke en la milita medio li kiel kutime laboris per Esperanto por la liberigo de Ĉinio. Veninte al la liberigita regiono, li ekhavis gajan humoron kaj ricevis bonan zorgadon de la partia organizaĵo, tamen la militaj cirkonstancoj ne permesis al li ĝui trankvilan ripozon. Vintre de 1949 lia malsano pli graviĝis. Malgraŭ kuracado li mortis la 15-an de marto 1950.

Kvankam pasis pli ol 30 jaroj de post kiam li mortis, tamen ni ankoraŭ bone tenas en nia memoro lian revolucian spiriton de sinoferemo al la liberigo de la patrolando kaj la disvastigo de Esperanto.

Lidia Zamenhof



L IDIA Zamenhof, la plej juna el la tri infanoj de d-ro L. L. Zamenhof, naskiĝis la 29-an de januaro 1904, en Varsovio. Ŝiaj gepatroj estis liberpensaj hebreoj, kaj ili prizorgis al siaj filo kaj filinoj bonan edukadon. Adam Zamenhof fariĝis la plej elstara okulspecialisto de tiu urbo; Sofia estis kuracistino; kaj Lidia ricevis sian magistran diplomon pri juro ĉe la Universitato de Varsovio.

Estis neeviteble, ke Lidia estu idealistino. La patro estis la eminenta iniciatinto de Esperanto; kaj la patrino Klara Zilbernik estis lia sindetenema tamen fervora kaj kuraĝiga kunulino. Amo al la tuta homaro ŝvebis en la atmosfero de ilia modesta hejmo, kaj kune la gepatroj edukis la infanojn en spirito de mond-unueco kaj frateco. Sekve estis nature, ke kiam ŝi ricevis sian magistran diplomon en 1925, Lidia decidis ne esti advokato, sed dediĉi sian tempon al la disvastigo kaj instruado de Esperanto. Kiel rajtigita instruistino de la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto ĉe Hago, ŝi vojaĝis

kaj instruis en multaj landoj en Eŭropo. Ŝi fariĝis la plej ŝatata instruistino de la Instituto krom pastro Andreo Cseh, la fondinto. En Francujo, kie ŝi pasigis plurajn jarojn, oni ameme nomis ŝin "La Diino".

Lidia fariĝis bahaanino pere de f-ino Martha Root. En aprilo 1926 f-ino Root ĉeestis la stariĝon de monumento sur la tombo de d-ro Zamenhof en Varsovio. Estis tie, kie Lidia diris al ŝi. "Ŝajnas al mi, ke Esperanto estas lernejo por estontaj bahaanoj. La bahaa kredo estas pli ampleksa, unu paŝo antaŭen." Kelkajn monatojn poste, la 18-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Edinburgo, Skotlando. La 2-an de aŭgusto Martha Root prelegis ĉe la bahaa kunsido. Tie, en Edinburgo, kie Abdulbaha en 1913 faris sian klasikan prelegon al la esperantistoj, Lidia Zamenhof ĉeestis por la unua fojo bahaan kunsidon.

Tuj poste Lidia komencis la malfacilan taskon lerni la anglan lingvon, ĉar tiutempe ne estis bahaa literaturo en la pola lingvo aŭ en Esperanto.

Lidia havis multajn talentojn. Ŝia magneta ĉarmo estis senegala. Ŝi estis denaska instruistino kaj prelegistino, kaj ŝia kapablo traduki kaj verki estis superega. Ŝi esperantigis la bone konatan verkon de Sienkiewicz "Quo Vadis?", "Iridiono" de la klasika pola verkisto Krasinski, kaj kelkajn novelojn de B. Prus. Kiam ŝi fariĝis bahaanino, ŝi de-

diĉis siajn talentojn al tradukado kaj verkado de bahaa literaturo. Multaj el ŝiaj artikoloj aperis en anglalingvaj kaj Esperantaj periodaĵoj mondvastaj. Ŝi tradukis en Esperanton naŭ bahaajn librojn, kaj tri en la polan lingvon.

Mi memoros por ĉiam mian unuan personan renkontiĝon kun Lidia. Estis la 31-a de decembro 1937. Mi pasigis la Novjaran semajnofinon apud Nov-Jorko, ĉe mia fianĉo (nun mia edzo) kaj liaj gepatroj. Ni iris al la bahaa kunveno en Nov-Jorko. Enirinte la ĉambregon, mi vidis ŝin por la unua fojo. La filino de la Majstro! En angulo ŝi sidis — la malgrandulino — sur longa sofo, sola, aparta de la babilantaj grupoj. Sur ŝia vizaĝo estis tiu neforviŝebla esprimo de malĝojo, kiu karakterizas la vizaĝon de ĉiu judo.

Mi alproksimiĝis al la blonda, silenta, verdflave vestita museto, kaj mi vidis du belajn, bluajn okulojn, sed plenajn de soleco. Mi komprenis, ĉar ankaŭ mi estas juddevena. Kiel unu Cseh-metoda instruistino al alia, mi diris: "Bonan vesperon! Mi estas Roan Orloff. Kiu estas vi?" Tuj, per la magio de tiuj Esperantaj vortoj, per la feliĉa sento de tiu mondfama Cseh-metoda prezentiĝo — tuj, la malĝoja vizaĝesprimiĝo ŝanĝiĝis al rideto, eĉ rido brilis en la bluaj okuloj, dum ŝi respondis: "Mi estas Lidia Zamenhof!" Kaj mi konatiĝis per-

sone kun la "Amatino de Esperantujo".

La 28-an de novembro 1938 Lidia Zamenhof reiris al sia patrujo. Minacis ekmilito, kaj ŝia amema koro sopiris esti kun la gefratoj en la malfacilaj tempoj. En Varsovio ŝi finis la polan tradukon de BAHĀ'U'LLĀH KAJ LA NOVA EPOKO. Mi memoras, ke, kiam ni estis ĉe Green Acre, ŝi sidis sur la verando kaj dediĉis ĉiun liberan momenton al tiu traduko. "Mi devas rapidi kaj fini ĝin kiel eble plej baldaŭ," ŝi konfidis al mi. En letero al mi tuj post la hejmenreveno, ŝi priskribis, kiel la frato, d-ro Adam Zamenhof, permesis al ŝi "konfiski" lian skribmaŝinon, ĉar la ŝia ne havas polingvajn literojn.

Sia lasta letero al mi, datita 18 aŭgusto 1939, estis ankaŭ ŝia lasta letero al Usono. Ŝi skribis: "Nun estas kvin bahaanoj en Pollando, inkluzive min." Ŝi

priskribis planon ĉeesti la Polan Esperanto-Kongreson en Lwow en septembro, poste vojaĝi al Nederlando. Nek la Kongreso nek la vojaĝo okazis, ĉar du tagojn poste la malamiko invadis Pollandon. Poste, nur nerekte ni aŭdis pri ŝi, malgraŭ la klopodoj de la Internacia Ruĝa Kruco. Unue ŝi kaj ŝiaj parencoj, kune kun ĉiuj aliaj hebreoj de Varsovio, estis kondukita en getton. En 1942 la Zamenhof-familio estis translokita en koncentrejon. Antaŭ tio, ĉiuj profesiaj hebreoj de Varsovio estis mortpafitaj. Inter ili estis d-ro Adam Zamenhof. En aŭgusto 1944 Sofia kaj Lidia Zamenhof, kune kun multaj aliaj hebreoj, estis cindigitaj en la hebrea mortigejo en Treblinka, proksime al Varsovio.

Ĝis la lasta spiro Lidia Zamenhof restis heroino, ĉiam pensema pri la bonfarto kaj sekureco de aliaj. Kiam evidentiĝis, ke la loĝantoj de la getto estos

pereigitaj, la nehebreaj esperantistoj de Varsovio proponis kaŝi ŝin de la invadintoj. Ŝi rifuzis, ĉar ŝi volis resti kun la familio. Krome, ŝi diris, ke terura morto atendas tiujn, kiuj kaŝas hebreojn, kaj ŝi ne volis endanĝerigi la vivojn de la amataj Esperanto-geamikoj. Tiamaniere ŝi mortis.

Pri ŝia tro frua kaj tragedia morto pastro Andreo Cseh skribis al mi, en letero datita 7 februaro 1946:

"Ho nia kompatinda, kara Lidia! Laŭ la informo ricevita ŝi suferis teruran morton. Kiamaniere Dio punos la kulpulojn? Ilia krimo vere superas ĉiujn ĝis nun konatajn klopodojn."

La sinoferemo, la persistemo, la sindediĉo kaj amema servado de Lidia Zamenhof en ŝiaj fervoregaj kaj senlacaĵaj klopodoj por monduoneco restos por ĉiam en niaj koroj kaj en niaj memoroj.

Aĉeto de Kombilo

(HUMURAĴO DE LA ANTIKVA ĈINIO)

1 Estis viro, kiu iros komerci aliloke. Montrante al la novluno sur la ĉielo, lia edzino diris: "Antaŭ via reveno vi aĉetu por mi kombilon en formo de la novluno."

2 Fininte la komercadon, la viro estis preta iri hejmen. Levinte la kapon li ekvidis la rondan lunon kaj tiam aĉetis por sia edzino spegulon rondan kiel la luno.

3 La edzino rigardis sin en ĝi kaj forte surpriziĝis, ĉar ŝi ne sciis, ke la virino en la spegulo ja estas ŝi mem.

4 Ŝi ekploreis krian-te: "Vi alkondukis la virinon anstataŭ aĉeti por mi kombilon."



Rakontas niaj perantoj

En la lastaj jaroj rimarkinde kreskis la nombro de abonantoj de El Popola Ĉinio, kaj tion ni ŝuldas ankaŭ al la diligenta laboro de niaj perantoj kaj helpo de niaj samideanoj en diversaj landoj. Pro tio ni esprimas al ili plej sinceran dankon, dume ni esperas, ke ili skribos al ni artikolojn pri sia sperto en la peranta agado por ke niaj legantoj informiĝu kun intereso kiel ili laboras por Esperanto kaj interkompreniĝo. Ni kredas, ke dank' al la kunlaboro de diverslandaj amikoj ankoraŭ plimultiĝos niaj abonantoj.

La Red.

LEOPOLD PATEK

(Aŭstrio)



En la jaro 1970 kiam mi esperantistiĝis, mi serĉis, kiel ĉiu novbakita esperantisto, Esperantajn leĝaĵojn. Baldaŭ mi ankaŭ legis EPC, kaj mi abonis la gazeton en la jaro 1973.

Kvankam tiam EPC estis tro "politikeca" kaj "ideologia", kompare kun la nuna EPC, tamen mi trovis ĉiam legindajn artikolojn, ĉar Ĉinio estis tute fremda lando por mi. EPC ankaŭ vekis en mi la interesiĝon, ke mi aĉetis taŭgan radioricevilon por aŭskulti Esperanto-elsendojn, precipe la disaŭdigojn de Radio Pekino. Ekde tiam, kiam mi sukcese kaptis la elsendon de Radio Pekino, la fora Ĉinio ne plu estas tiel fora lando kiel antaŭe. Tio okazis en 1978, kaj ankaŭ mia koresponda kontakto kun Radio Pekino komenciĝis samjare.

Pri mia koresponda kontakto kun Radio Pekino mi rakontis al s-ino Antonie Sindl, iama pe-

ranto de EPC. La sorto volis, ke s-ino Sindl, dum la abonvarba kampanjo de EPC en 1979, malŝanĝis, kaj pro tio ŝi tuj bezonis anstataŭanton por sia EPC-agado. Tial ŝi petis min transpreni la taskon de EPC-peranto kaj mi akceptis.

De s-ino Antonie Sindl mi transprenis 26 EPC-abonantojn.

Ĉar ekzistas en Aŭstrio la Esperanto-redakcio de ORF (Aŭstria Radiofonio kaj Televido), mi petis GUOJI SHUDIAN alsendi porrecenzan ekzempleron al ĝi. Ekde tiam la Esperanto-redakcio de Radio Vieno, en sia elsendo sur mallongondo, recenzas ĉiumonate la gravan enhavon de EPC. Tio estas granda helpo por mia perada agado, kaj



* Mi deziras korespondi, amikiĝi kun geesperantistoj tutmondaj pri ĉiu temo. Mi komprenas ne nur Esperanton, sed ankaŭ mi komprenas anglan, francan, italan kaj hispanan, kiu estas mia gepatra lingvo. David G. Valecillos V., Calle 79 No. 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuela.

* F-ino Mari-Mar Mota Sepulveda (17-jara), str. Portugal 16, Crip-tana — Ciudad Real-, Hispanio, dez. kor. kun gekorespondantoj tutmonde sed precipe el Ĉinio, Japanio, Hindio, Grekio, Egiptio, pri filozofio kaj diversaj temoj.

* F-ino Margarita Calonge L. -Pintor (20-jara studento pri pedagogio), str. Somontin 108-60 B, Madrid-33, Hispanio, dez. kor. kun junuloj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Japanio, Vjetna-

mio, Sudafriko, pri sociaj kaj popolmoraj temoj.

* 23-jara knabo, studento pri ĵurnalismo, dez. kor. kun homoj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Hindio, Sovetio, Norvegio, pri literaturo, kino, filozofio. S-ro Bernabe Olmedo Romeral, str. San Isidro 15, Criptana-Ciudad Real-, Hispanio.

* F-ino Pilar Fernandez de Quero De La Fuente (17-jara studentino), Str. Isaac Peral 15, Crip-

jam en 1979 grandiĝis la nombro de EPĈ-abonantoj de 26 al 39.

En la abonvarba kampanjo en 1980, mi aperigis la unuan EPĈ-anoncon en "BULTENO", organo de la Aŭstria Fervoĵista Esperanto-Federacio (AFEF), sekve la nombro de EPĈ-abonantoj altiĝis al 60.

En novembro 1980 publikigis la centra organo de la Sindikato de la Fervoĵistoj "Der Eisenbahner" ("La Fervoĵisto"), kiel unua aŭstria gazeto neesperanta, artikolon pri EPĈ sub la titolo "Drei ig Jahre 'El Popola Ĉinio'" ("Tridek jarojn EPĈ"). La artikolon mi prenis el la germanlingva ĉina gazeto "China im aufbau" ("Ĉinio en Konstruado"); mia filino havas abonon de ĝi. Tiu ĉi artikolo estis granda varbilo dum la abonvarba kampanjo en 1981, kaj post la kampanjo mi jam prizorgis 84 abonantojn.

Nature mi ankaŭ varbadas en grupkunvenoj de esperantistoj kaj dum Esperanto-aranĝoj. Ekzemple en decembro, dum la Zamenhof-a Festo, mi ĉiam prezentas ĉinajn librojn kaj EPĈ. Precipe la infanlibretoj plaĉas al la Esperanta publiko de Aŭstrio.

Nun finiĝis la abonvarba kampanjo de EPĈ en 1982, kaj mi nun prizorgas 107 abonantojn.

Je la fino mi povas komuniki ankoraŭ elstaran eventon. Nome, la aŭstria semajngazeto "NEUE ILLUSTRIERTE WOCHENSCHAU" ("Nova Ilustriita Semajnrigardo") aperigis sian unuan resuman tradukon el EPĈ, de la artikolo sub la titolo "EPĈ Uzita en Esp. Klasoj Universitataj" (EPĈ n-ro 11/1981, paĝo 22).

FELIX GOMEZ MARTIN (Hispanio)



Por varbado de novaj abonantoj kaj por renovigo de abonoj al El Popola Ĉinio mi agas sim-

pla-maniere. Mi metas anoncojn en la bultenoj de hispanaj lokaj Esp. grupoj, kaj mi eldonas hispan-lingve informajn foliojn pri la enhavo kaj abontarifo de EPĈ, sendante tiujn al Esp. societoj aŭ grupoj kaj al unuopuloj laŭ adresaro de la Hispana Esperanto-Federacio, kiun mi havas (ne aktualigita bedaŭrinde). Mi rememorigas la abonantojn, kiam finiĝas iliaj abonperiodoj, laŭ mia sliparo de hispanaj abonantoj.

Pri la disvendo de ĉinaj Esp. eldonaĵoj mi ankaŭ pretigis libroliston hispan-lingve kun prezoj laŭ hispana mono. Tiun liston mi sendas al unuopuloj kaj al la Hispana Esperanto-Federacio, kiu estas oficiala librovendisto por la hispana esperantistaro. Kiel vi povas vidi, ĉion mi plenumas hejme kaj sendas poŝte, krom kiam okazas la kongresoj de hispanaj esperantistoj, kaj tiam mi klopodas rektmaniere varbi novajn abonantojn kaj diskonigas ĉinajn Esp. eldonaĵojn.

Krom la laboro supre menciita mi respondas leterojn kaj sendas propagandilojn kaj specimenojn de EPĈ al la petintoj.

tana-Ciudad Real-, Hispanio, dez. kor. kun amikinoj tutmonde sed speciale el Ĉinio, Svislando, Pollando, pri literaturo, pentroarto kaj aliaj temoj.

Universitata disertacio

F-ino Eleonora Worsztynowicz, studentino pri libroscienco en la Universitato de Poznan, preparas sian licencian disertacion s.t. "Esperantaj bibliotekoj en la mondo". Ŝi volonte ekligos kontaktojn kun bibliotekistoj kaj serĉas informilojn

pri Esperantaj bibliotekoj, katalogoj kaj bibliografiojn. Adreso: ul. Poznanska 26 m. 37, PL63-100 Srem, Pollando.

* "Eldonejo & librejo SONORILO aspc", malaltaj sendkostoĵ, rapida servo, vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanto-libromarkato! Doornstraat 22, B-2610 Vilrijk, Belgio (Eŭropo).

Por grava oktobra ekspozicio, bonvolu sendi Esperantlingvajn turismajn broŝurojn, afiŝojn kaj urboplanojn. Antaŭdankojn, KATANIA ESPERANTO-GRUPO ĉe ROMANOVIAGGI-Via Vittorio Emanuele, 192 I-95131 CATANIA, Italio

Letervesperon, la 27-an de septembro, okazigos Esperanto-grupo Den Helder, Nederlando. Ni atendas leterojn kaj bildkartojn el la tuta mondo. Skribu al: Esperanto Klubo Den Helder, Tseilesstraat 11, 1784 SW Den Helder, Nederlando.

ESP-ASOCIO DE ZHENJIANG FONDITA

La 9-an de majo okazis la inaŭguro de la Esperanto-Asocio de Zhenjiang, Jiangsu-provinco, kiun partoprenis pli ol okdek personoj, inkluzive de respondeculoj de la Propaganda Departemento sub la Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, la Scienc-teknika Asocio de la urbo, la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de Jiangsu-provinco kaj esperantistoj el diversaj servolokoj de la urbo. La inaŭguron salutis ankaŭ reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de la urbo Nankino, Suzhou, Wuxi kaj Yangzhou. La kunvenantoj aŭskultis la raporton de Wang Chongfang pri la nuna Esperanto-movado de Zhenjiang kaj ĝia estonta tasko, diskutis pri la laboro farenda por la asocio kaj ties statuto kaj elektis Wang Chongfang kiel prezidanton de la asocio kaj Zhong Jijiang kaj Sui Hesheng kiel ĝiajn vicprezidantojn.

ESPERANTO-INSTITUTO DE HUNAN ESTABLITA

Por levi la lingvo-nivelon kaj kulturi Esperantajn aktivulojn, la Esperanto-Asocio de Hunan-pro-


Inaŭguro de la perfektigu Esp-klaso en Anhui-universitato

vinco establis Esperanto-Instituton en la dua tagdeko de aprilo. Sub la prizorgo de Xie Zujun, vicprofesoro de la fremdlingva fakultato de la Instruista Instituto de Hunan, la Esperanto-Instituto ĉiumonate aranĝas kunsidon por voĉlegi aŭ interŝanĝi disertaĵojn, studi la gramatikon de Esperanto kaj diskuti pri la traduka lerteco kaj instrumentado. La asocio ankaŭ funkciigas duagradan kurson de Esperanto daŭrantan unu jaron kaj gvidatan de Yang Kaiyuan, vicprezidanto de la Esperanto-Asocio de Hunan.

PERFEKTIGA ESP-KURSO EN ANHUI-UNIVERSITATO

Posttagmeze de la 15-a de majo okazis la inaŭguro de la perfektiga Esperanto-kurso en la fremdlingva fakultato de Anhui-universitato. La kurson partoprenas 34 lernantoj laŭ

*La kunveno por fondo de la
Esperanto-Asocio de Zhenjiang*



propono de Esp-organizaĵoj de la provinco kaj post sukcesa trapaso de ekzameno. La kurso daŭros eble unu jaron, kun Yu Guojian, vicsekretario de la Esperanto-Instituto de la provinco, kiel sia gvidanto. La inaŭguron ĉeestis Yu Yuan, Yang Baichuan, Sun Qiyang kaj Yang Xingfu, respondeculoj de la Provinca Federacio de Sociaj Sciencoj, la Provinca Eduka Departemento, Anhui-universitato kaj la Esperanto-Instituto de la provinco.

ESPERANTO AKTIVIS EN TRI ĈINAJ ALTLERNEJOJ

Por propagandi kaj instrui Esperanton esperantistoj de la Poŝta kaj Telekomunika Instituto de Nankino, subtenate de siaj lernejestroj, okazigis du Esperanto-kursojn unu post la alia ekde oktobro pasintjare kaj fondis propran organizaĵon.

La 14-an de majo Jishou-universitato de Hunan-provinco fondis preparan komisionon de Esperantostudrondo. En la kunveno Wu Li-guang, instruisto de la fremdlingva fakultato, pritraktis la disvolviĝon de Esperanto kaj ĝian estontecon.

La 29-an de majo la Esperanta studrondo de la Ŝanhaja Martransporta Instituto okazigis kunsidon por festi sian unu-jariĝon. En la kunsido pliaj kursanoj ricevis diplomon kaj lernantoj de la studrondo donacis al la biblioteko de la instituto Esperantajn revuojn, librojn kaj bildkajerojn.

ESPERANTO-GRUPO DE GUILIN FONDITA

La 16-an de majo en la fama ĉina turisma urbo Guilin fondiĝis Esperanto-grupo sub la favoro de la loka registaro. Nun en la urbo estas 250 lernantoj de nia lingvo.


SOCIETO POR POPULARIGO DE ESPERANTO EN DUNHUA

La 12-an de majo esperantistoj de la gubernio Dunhua, Jilin-provinco, starigis la Societon por Popularigo de Esperanto, kiu havas sub si kvin studrondojn.

INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTO-TEATROJ EN HUNGARIO

Enkadre de la Budapeŝta Printempa Festivalo okazis Internacia Renkontiĝo de Esperanto-teatroj inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982, kun entute 12 teatraj prezentaĵoj fare de aktoroj el kvar landoj: Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetunio. Ludis interalie la Pola Esperanto-Teatro, la Teatro Internacia de Akvitanio "La Krizalido"

Sceno el "La Aŭroroj Ĉi Tie Estas Silentaj" prezentata dum la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-teatroj



kaj la Esperanto-Teatro en Lenigrado. La renkontiĝon iniciatis kaj financis la Hungarlanda Turisma Oficejo, konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo. Baldur Ragnarsson, la vicprezidanto de UEA, sendis saluleteron al la renkontiĝo. Plenumante bonegan prezentadon la hungaraj aktoroj (inter kiuj sin trovis iuj tutlande konataj per kino kaj televido) kaj iliaj elstaraj alilandaj kolegoj kune donacis al la esperantista kaj neesperantista publiko teatran travivaĵon vere memorindan. Estas antaŭvidita ripetiĝo de ĉi tiu kultura aranĝo dum la Budapeŝta Printempa Festivalo en 1983.

REVIGLIĜIS LA ESP-MOVADO EN SPLIT, JUGOSLAVIO

La Societo de Amikoj de la Internacia Lingvo Esperanto "Ivo Lola Ribar" en Split dum sia trijara ekzisto, sed precipe dum la pasinta jaro, atingis kontentigajn rezultojn, inter kiuj estis la aktiva eldonado de la dulingva bulteno "Esperanto" kaj regule organizitaj E-kursoj. La 28-an de marto 1982 okazis ĉefkunveno, en kiu s-ro Davor Grgat emfazis, ke nun oni devas plani pri la centjara jubileo de la Internacia

Lingvo, kun la intenco organizi regionan aŭ respublikan kunvenon de esperantistoj.


LA 37-A KONGRESO DE SAT- AMIKARO


La 37-a kongreso de la Laborista Esperanto-Asocio por Franclingvaj Landoj (SAT-Amikaro) okazis de la 10-a ĝis la 12-a de aprilo en St-Pierre-Dechandieu, proksime al Liono.

En sia rezolucio la kongreso alvokis interalie la atenton de la deputitoj, la senatanoj kaj la ministroj pri edukado, por ke Esperanto estu progresive enkondukata en la programojn de duagrada kaj supera instruado kiel elektebla lingvo; invitis la departementajn kaj la komunumajn konsilantarojn faciligi ĉiujn klopodojn de la Esperanto-organizaĵoj rilate al la enkonduko de Esperanto kaj invitis la internaciajn radiostaciojn enkonduki Esperanton en siajn programojn por malfermi al ĉiuj popoloj, kies lingvoj ne estas enkondukeblaj pro praktikaj aŭ financaj kialoj, alireblecon al pli vastaj kaj sendiskriminaciaj komunikado kaj informado.

(Daŭrigota sur p. 38)

La lernantoj de la kurso Lusin





EKSPOZICIO DE ĈINAJ ANTIKVAJ TRADICIAJ TEKNIKOJ EN KANADO

La ekspozicio inaŭguriĝis la 30-an de aprilo en la urbo Toronto, Kanado, sub la aŭspicioj de la Prepara Komitato por la Domo de Ĉinaj Sciencoj kaj Teknikoj kaj la Scienca Centro de Ontario. Krom objektoj pri la kvar ĉinaj antikvaj eltrovoj — paperfarado, presarto, pulvo kaj kompasoj — estas ankaŭ pli ol mil eksponaĵoj pri la atingoj de la antikva Ĉinio en arkitekturo, astronomio, fandado kaj muldado de bronzo, ceramiko, teksado, brodado, preparado de ĉinaj medikamentoj kaj mekaniko. La ekspozicio spegulas la antikvan kulturon de Ĉinio kaj ĝiajn kontribuojn al la homa civilizacio.

Dum la eksponado 18 elstaraj ĉinaj specialistoj demonstras bronzo-muldadon, sigelilgravuradon kaj argilomodladon, imitante antikvajn teknikojn. Ankaŭ la vizitantoj havas ŝancon provfari iujn ĉinajn metiartaĵojn. La ekspozicio altiras multajn rigardantojn kaj ricevas iliajn laŭdojn. Iu diris, ke la ekspozicio estas tre grava por helpi kanadanojn ekkoni la kulturon kaj historion de Ĉinio. La vizitantoj opinias, ke tio estas la plej signifa kultura interŝanĝo farita de Ĉinio kaj Kanado en la lastaj jaroj.

La ekspozicio daŭros ses monatojn en Kanado kaj okazos poste en Usono kaj aliaj landoj.

JUNAJ ĈINAJ MUZIKISTOJ EN BRITIO

Kvar junaj ĉinaj violonistoj kaj pianistoj Wu Ying, You Xiao, Li Weigang kaj Jia Hongguang estis invititaj de la Brita Disaŭdiga Kompanio al Britio. De la 5-a ĝis la 14-a de majo ili ludis, ĉe radio-

stacio en Londono, Manĉestro kaj Glasgovo, muzikpecojn de Ŝopeno, Mozarto, Betoveno kaj Saint-Saëns. Wu Ying kaj You Xiao ludis respektive la pianan muzikajon "Cent Birdoj Omaĝas al Fenikso" kaj la violonajn muzikajojn "Marborda Poemo" kaj "Ora Forno", verkitajn de ĉinaj komponistoj. Respondeculo, kiu zorgas pri la aranĝo de muzikaj programoj por la Brita Disaŭdiga Kompanio, diris, ke la ĉinaj muzikajoj tre plaĉas al aŭskultantoj.

EKSPOZICIO PRI ĈINAJ URBOJ KAJ VILAĜOJ EN PARIZO

La ekspozicio malfermiĝis la 18-an de majo en la Kultura Centro Pompidou en Parizo. Ĝi estas okazigita de la Centro de Industriaj Kreoj sub la Kultura Centro Pompidou kaj la Ĉina Arkitektura Asocio. La ekspozicio prezentas al la publiko la urban konstruadon de Pekino, Ŝanhajo, Tangshan kaj Kantono, projektojn de loĝdomoj en ĉinaj urboj kaj kamparo kaj modelojn de kaverndomoj kaj jurtoj en norda Ĉinio. La vizitantoj tre interesiĝis pri loĝdomoj de kamparanoj kaj urbanoj en norda Ĉinio. La ekspozicio spegulas la vivon en ĉinaj urboj kaj vilaĝoj. Ĝi fermiĝos la 20-an de septembro.

FAMA SVEDA POETO ESP-MARK GASTIS EN ĈINIO

Invitite de la Ĉina Verkista Asocio, la fama sveda poeto kaj verkisto Kjell Espmark vizitis Ĉinion en majo. Li estas membro de la Sveda Akademio komisiita transdoni la literaturan Nobel-premion. Je la 4-a de majo Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, intervidiĝis kun li en Pekino kaj interparolis kun li pri la problemoj de literatura verkado. Bakin diris, ke verkistoj devas tuŝi la koron de legantoj per siaj verkoj kaj la kultura interŝanĝo estas kanalo por akceli la interkomprenon kaj amikecon inter la du popoloj. S-ro Espmark diris, ke la ĉina literaturo

havas grandan influon sur la svedajn verkistojn kaj li ĝoje vidas, ke la ĉina popolo konas kaj ŝatas la svedan literaturon.

ĈINA-USONA SIMPOZIO PRI MONTA METEologio EN PEKINO

La simpozio daŭris de la 18-a ĝis la 23-a de majo en Pekino. Pli ol 50 ĉinaj kaj usonaj meteologoj diskutis pri tiaj temoj, kiel leĝo de movo de klimataj sistemoj en diversaj skaloj kaj ilia ŝanĝo sub la influo de topografio, kaj la efiko de la granda topografio sur la cirkulaj sistemoj de la atmosfero. En la simpozio estis voĉlegitaj 30 disertajoj.

E. R. Reiter, la usona prezidanto de la simpozio kaj profesoro de la Fakoj de Atmosfera Scienco en la Koloradia Universitato, diris en la inaŭguro, ke kvankam Ĉinio kaj Usono havas malsamajn ekonomian kaj politikan sistemojn, la sciencistoj de la du landoj devas plifortigi siajn amikecon kaj interkomprenon, ĉar estas multaj aferoj farendaj.

MEMORE AL LA RUSAJ PEN-TRISTOJ KRAMSKOJ KAJ ŜIŜKIN

Je la 21-a de majo la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, la Ĉina-Sovetunia Amikeca Asocio kaj la Ĉina Belartista Asocio okazigis kunvenon por memorigi pri la fama rusa portretisto kaj recenzisto I. N. Kramskoj je la 145-a datreveno de lia naskiĝo kaj pri la fama rusa pejzaĝisto I. N. Ŝiŝkin je la 150-a datreveno de lia naskiĝo.

Xie Bangding, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, diris en la kunveno, ke multaj elstaraj verkoj de la du pentristoj estis enkondukitaj en Ĉinion jam en la 50-aj jaroj kaj bone akceptitaj de la ĉina popolo. Li diris ankaŭ, ke iliaj pentraĵoj havis influon sur la ĉinan pentrarton kaj restas elstaraj artaj heredaĵoj studindaj por ni hodiaŭ.



Gaja Ekskurso

Fotoj de YAN YIN



En la malfrua printempo ĉijare, laborantoj de ĈEL kaj EPC, kursanoj de la Porinstruista Esperanto-kurso de la Pekina Fremdlingva Instituto kaj s-ro Geoffrey Sutton, volontulo por la redakcio de EPC, faris ekskurson al la fame konataj Orientaj Maŭzoleoj de Qing-dinastio kaj havis tie agrablan tagon.

La maŭzoleoj sin trovas 125 km. nordoriente de Pekino kaj estas unu el la plej grandiozaj maŭzolearoj de Ĉinio. Tie konstruiĝis 15 maŭzoleoj de imperiestroj kaj iliaj parencoj de Qing-dinastio de la 17-a ĝis la 19-a jarcento. La tuta maŭzolea regiono kovras 48 kvadratajn kilometrojn.

Tie la ekskursantoj rigardis ore brilajn halojn, kioskojn, pavilonojn, delikate gravuritajn tomoŝtonojn kaj elterigitajn objektojn. Precipe la subteraj palacoj de la imperiestro Qianlong kaj la imperiestra patrino Cixi donis al ili neforgeseblan impreson. Ili piknikis sur monteto kaj tie junaj esperantistoj prezentis programerojn.




Gejunuloj en



Ŝprucigo de insekticido



Observado de katalpaj fruktoj





Montvilaĝo

Fotoj de LAO BAI

Leijafan estas malgranda vilaĝo en Yichang-gubernio de Hubei-provinco. Tie loĝas 230 kamparanaj familioj kun pli ol 170 gejunuloj. Tiuj junaj kamparanoj transformis sian hejmlokon per siaj diligenta laboro kaj akiritaj scioj. Dank' al ili pliiĝis produktkvanto de greno kaj kotono kaj fondiĝis katalpo-kultura instituto. Ciujare ili rikoltas pli ol 5 000 kg. da katalpaj fruktoj, kies oleo povas esti uzata por industrio, tiel ke pliiĝis la enspezo de la vilaĝo.


Laborpaŭzo



Novedzino iras al la hejmo de
siaj gepatroj kune kun la novedzo.



Rendevuo



Filmoprojekciado
por vilaĝanoj

ĈINA VENDA EKSPOZICIO DE INFANAJ VIVBEZONAĴOJ

La ekspozicio kiel la unua porinfana ekspozicio post la fondiĝo de la nova Ĉinio malfermiĝis la 20-an de majo en la Pekina Ekspoziciejo kaj daŭris unu monaton.

La ekspozicio kun areo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj dividiĝis en kvar partojn por vendi ludilojn, manĝaĵojn, vestaĵojn kaj aliajn vivbezonaĵojn. Estis diversaj ludiloj kun naciaj kaj lokaj karakterizaĵoj, kiel instruaj, saĝigaj, movaj, ornamaj, tradiciaj kaj amuzaj ludiloj kaj grandegaj mekanikaj ludiloj. Troviĝis ĉefmanĝaĵoj, almanĝaĵoj, sagnigaj kaj tonikaj manĝaĵoj, figuraj manĝaĵoj k.a. Estis montrataj kaj vendataj ankaŭ modaj porinfanaj vestoj, inkluzive de kap- kaj piedvestoj el kaŭĉuko, plasto, ledo kaj tolo.



ĈINA AŬTO-INDUSTRIA KORPORACIO FONDITA

La korporacio fondiĝis en la komenco de majo en Pekino. Ĝi estas la dua ĉina plurbranĉa faka kompanio post la apero de la Ĉina Generala Ŝip-industria Kompanio. Nun la korporacio ampleksas 140 unuigitajn kompaniojn, fabrikojn, informajn kaj scienc-esplorajn instituciojn. Ĝia fondiĝo estas favora al produktado laŭ faka kunlaboro, al renovigo de produktaĵoj kaj teknika reformo de entreprenoj kaj

akcelas sanan disvolviĝon de la aŭta industrio.

KVAR NATURAJ REZERVEJOJ POR MIGRAJ BIRDOJ STARIGITAJ EN GANSU

Tri dolĉakvaj lagoj kaj unu marĉo en la provinco Gansu, nordokcidenta Ĉinio, estas difinitaj kiel naturaj rezervejoj por migraj birdoj.

En Gansu troviĝas 501 birdospecioj, kiuj konsistigas pli ol 24% de la totala nombro de la birdospecioj de Ĉinio. Inter la 501 estas 247 specoj de migraj birdoj, kiel cignoj, grizaj sovaĝanseroj, stri-kapaj sovaĝanseroj, verd-flugilaj anasoj, pinglo-vostaj anasoj kaj grizaj grupoj.

OLEPUTO KUNE BORITA DE ĈINIO KAJ JAPANIO

En la ĉina kaj japana kunlabora regiono de la olekampo Bohai-marĉo oni boris en majo 1982 la unuan puton profundan je 3 990 metroj. Post mezurado kaj esploro oni taksis, ke ĝi ĉiutage donos 390 tunojn da nafto kaj 70 800 kubmetrojn da natura gaso.

PRINTEMPA ARBOPLANTADO DE ĈINIO

Kiel la ĉina arbara administrado informis, ĉi-jare diversaj lokoj de Ĉinio ĉiu starigis verdigan komisionon, plenumis printempan plantadon de 1.1 miliardoj da arboj, arbarigis pli ol 2 300 000 hektarojn da kalvaj kampoj kaj kulturis 180 000 hektarojn da arbidoj. Sole en Pekino kvar milionoj da homoj partoprenis en la arboplantado.

GRANDA FORCEJO POR ARBIDOJ KONSTRUITA EN PEKINO

La unua granda ĉina forcejo Langshan sub la Pekina Arbida Kompanio konstruiĝis kaj komencis funkcii. Ĝi konsistas el dek unu arkaj domoj kun areo de pli ol 5 400 kvadrataj metroj. Ĉiu domo kun aluminiola framo estas kovrita per sintezfibra vitro kaj ekipita per aŭtomatoj por reguligi tempera-

turon kaj humidecon. Nun en la forcejo estas kulturitaj pli ol tri milionoj da arbidoj, kiel cipresoj, cedroj kaj rozoj. La forcejo tutjare laboras, ĉar ĝi estas hermetika kaj neniam influata de sezono aŭ klimato.

LA 12-A ĈINA FOTO-EKSPOZICIO EN PEKINO

La ekspozicio okazis en majo en la Belarta Domo, Pekino. En ĝi montriĝis 367 fotoj elektitaj el pli ol 14 000 fotoj de pli ol 4 000 aŭtoroj. Inter la eksponaĵoj troviĝis 116 blankaj-nigraj kaj 251 koloraj fotoj. Juĝkomisiono el 16 famaj fotistoj aljuĝis orajn, arĝentajn kaj kuprajn medalojn al 40 nigraj-blankaj kaj koloraj fotoj.

PLI OL 700 RESTORACIOJ NŬVE KONSTRUITAJ EN PEKINO

Dum la lastaj tri jaroj oni konstruis pli ol 700 restoraciojn en Pekino. La restoracioj lokiĝas plejparte en loĝkvartaloj kaj industriaj kvartaloj aŭ apud parkoj. Ili servas al klientoj per matenmanĝo, etmanĝaĵoj, varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj, ĉinaj kaj okcidentaj pladoj.

Ilin administras ĝenerale intelektaj gejunuloj, kiuj antaŭe estis senlaboraj.

PREMIADO AL ELSTARAJ TEATRAĴOJ

Antaŭ nelonge Ĉinio premiis elstarajn dramojn kaj operojn de 1980-1981. Pli ol mil homoj partoprenis en la ceremonio de premiado aranĝita de la Kultura Ministerio kaj la Ĉina Dramista Asocio.

Estis premiitaj 72 elektitaj el 376 teatraĵoj el diversaj lokoj de la lando. Du trionoj de la premiitaj verkoj temas pri nuna socia vivo. Kvar el ili estas dramoj kun temo pri vilaĝaj aferoj, en kiuj intrigo estas kortuŝa kaj la herooj profunde modlitaj. Ankaŭ iuj tradiciaj dramoj kaj operoj ricevis premion. La premiitaj teatraĵoj reprezentas la ĉefan fluon de la hodiaŭaj ĉinaj teatraĵoj.

IUN tagon de novembro 1978, iu junulo kaj junulino interkonatiĝis en la atendejo de la Pekina Stacidomo. La junulino nomiĝas Yang Zhaoyan. Ŝi venis de Changping-gubernio de Pekino por kuraci sian mezan otiton. La junulo nomiĝas Qi Zusheng, trompisto fame konata tra la urbo Weihai, Shandong-provinco. Li migradis de loko al loko kaj haltis nun en Pekino. En sia interparolo kun la junu-

MOU LIANGWEN:

Eksterordinara Amo

lino li mensogis, ke li estas aĉetisto de fabriko de la urbo Yantai. Krome li ankaŭ elpensis historion, ke li venis ĉi tien pro malfeliĉo. La vortoj de la elegantulo vekis simpatian de la

naiva junulino, kaj ĉe la disiĝo ili interŝanĝis la adresojn.

Pasis kelkaj tagoj, kaj Yang Zhaoyan ankoraŭ ne sukcesis enhospitaliĝi, kaj Qi Zusheng helpis ŝin solvi la problemon. Por tio ŝi estis tre danka al li. Post kiam ŝi estis operaciita, li flegis ŝin tre sincere. Pro la ŝveligo de la buŝo ŝi ne povis mem manĝi, li do manĝigis ŝin per fluidaĵo kuleron post kulero. Kiam ŝi sentis enuon, li amuzis ŝin per rakontoj kaj humuraĵoj. Tiel li konkeris ŝian koron. Ŝi ne nur konfidis al li siajn 500 juanojn pretigitajn por kuraco, sed ankaŭ promesis edziniĝi al li post sia resaniĝo.

En la komenco de 1979, la geamantoj forlasis Pekinon kaj atingis Yantai, de tie ili devis veturi per aŭtobuso al la urbo Weihai. Sed tiam okazis afero ekster atendo. La junulo aĉetis du biletojn kaj tuj ilin redonis.

La familio de Qi Zusheng



(Daŭrigo de p. 35)

LA LANDA KONGRESO DE UFE

La landa kongreso de la Unuiĝo Franca por Esperanto okazis en Orlano de la 28-a de majo ĝis la 1-a de junio 1982. Antaŭ la kongreso ekspozicio pri Esperanto funkciis en la kongresejo. Dum la kongreso okazis debatoj, ĝeneralaj assembleoj, bankedo kaj ekskursoj. Du monatojn oni uzis Esperantan stampon ĉe la poŝto en Orlano.

“SPECIALA LERNANTARO LUSIN”

Aŭguste de 1981 “Hito”, la Esperantista Rondo, kiun starigis la Manĉlanda Esperanto-Asocio (SEAM) en Hispanio, inaŭguris la unuan instrurajtigan Esperantokurson kun la oportuna kunlaboro de la Hispana Sekcio de la Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj. Okaze de la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Lusin, tiu deknulernanta promocio, la unua tiaspece, rice-

vis la nomon Speciala Lernantaro “Lusin”.

Ĉe “Hito” jam funkciis 42 Ekskursoj. La speciala kurso “Lusin” celis provizi tra Manĉlando la kreskantan bezonon por instrukapablaj gvidantoj de Esperanto. Ĝi solene finiĝis en aprilo ĉi-jare.

Por disvastigo de Esperanto, “Hito” jam planis por 1983 kolokvaron kaj prelegaron pri la ĉinaj kulturo kaj literaturo.

“Pardonon, vi tuj reiru al Pekino, mi estas kulpa antaŭ vi.” Li diris korprenate, elpoŝigis la restajn 20 juanojn kaj enmetis ilin en la manon de la junulino. Ŝi pensis, ke li ŝercas kun ŝi, kaj milde diris al li: “Mi jam decidis, ke mi iros nenien krom Weihai.” Qi Zusheng klarigis al ŝi kun tremanta voĉo, ke li estas trompisto, kaj li petegis ke ŝi tuj foriru por eviti malfeliĉon. Aŭdinte tion, ŝi ŝtoniĝis. Kiam ŝi komprenis, kia estas la afero, ŝi ekploregis. Ŝi vidis ke ankaŭ Qi sufokiĝis de plorado, kaj senombraj demandoj venis en ŝian kapon: Ĉu li efektive estas trompisto? Ĉu en la mondo estas tia trompisto kiel li, kiu ricevis 500 juanojn sed ne for-

kuris kaj eĉ konfesis al sia fianĉino sian krimon antaŭ la geedziĝo? . . . Tio estas tute neimagbla!

Fakte li ja estis trompisto konata de ĉiuj homoj en Weihai. Li faris pli ol 100 friponaĵojn, kiujn oni jam malkovris. Ne estis hazarde ke li suriris kriman vojon. En sia knabeco li perdis la gepatrojn. Tiam ĝuste estis la tumulta periodo de la kultura revolucio, dum kiu neniu zorgis lin. Por siaj vivrimedoj li komencis mensogi kaj friponi. Tamen li diferencis de aliaj trompistoj. Ĉiufoje li eldiris al la trompito siajn nomon kaj adreson. Pro tio li ŝuldis pli ol 700 juanojn kaj lia domo ofte

estis plena de kreditoroj.

Post kiam Qi Zusheng kun larmoj en la okuloj diris al ŝi sian travivaĵon, li konfesis ke komence li intencis fortrompi la monon, sed ŝia pura animo kaj ŝia plena kredo al li, nekonatulo, skuis lin. Li finfine komprenis, ke en la mondo estas ne nur trompo, sed ankaŭ honesto. Li ekpentis pri sia krimo kaj deziris fariĝi nova homo kun honesta konduto. Kaj cetere li aspiris amon. Tamen li ne kredis, ke homo kiel li povas akiri amon. Li subite haltis en sia parolado en malgajo kaj mallevis la kapon.

Ĝuste kiam li estis en silento, la junulino subite demandis lin: “Respondu el via koro, ĉu vi korektos viajn erarojn?” “Jes, certe!” “Ĉu vere?” “Mi ne rompos la vortojn. . .”

Aŭdinte la respondojn, ŝi trankviliĝis kaj diris kun firma sed milda voĉo: “Zusheng, vi diris sincere kaj mi amas vin kiel antaŭe. Mi kredas, ke vi povos fariĝi homo utila al la popolo. Ĉiaokaze mi tenos niajn rilatojn. . .”

La novaĵo, ke “trompisto Qi revenis kun bela junulino el Pekino”, tuj disvastiĝis en la strateto, ĉe kiu loĝis la junulo. Tiam koncerna fako decidis deadmoni la trompitan junulino. Liu, vicedestro de loka policejo, parolis kun ŝi du horojn kaj diris al ŝi la kriman agon de Qi Zusheng, kaj la lasta rekonis ĉiujn siajn konfesojn. Fine, kiam Liu petis ŝian opinion, ŝi diris: “Ĉion ĉi li jam diris al mi. Vi ĉiuj volas helpi lin, ankaŭ mi volonte tion faros. Ĉu tio ne estas pli bona?” La vicedestro bedaŭris: “Li estas malriĉega. . .” Yang respondis: “Mi volonte vivos kun li, eĉ se estos nur kaĉo trifoje ĉiutage.” Ŝi

Yang Zhaoyan laboras kiel infangardenistino.



komprenis liajn vortojn kaj daŭrigis: "Se vi nepre volas ke mi revenu hejmen, do lasu min resti ĉi tie por pli da tagoj, ke mi povu lavi kaj fliki por li vestojn kaj litkovrilojn. Post kiam mi revenos al mia hejmo, mi akumulos mian perlaboritan monon por pagi liajn ŝuldojn. Kaj mi edziniĝos al li tiam, kiam li ŝuldos al neniŭ." Ĝiaj koraj vortoj emociis la ĉeestantojn ĝis larmoj. La loka registaro akceptis ilian peton pri geedziĝo.

En ilia geedziĝa festo gvidantoj de la loka registaro kaj la loĝantara komitato prezidis la ceremonion, por kiu ili aĉetis cigaredojn, teon kaj bombonojn. Ankaŭ entuziasmaj najbaroj donacis al la novgeedzoj diversajn ĉiutagajn necesajojn. Post parolo de la prezidanto, estro de la laborperejo veninta por ilin gratuli, anoncis, ke oni akceptas Qi Zusheng kiel laboriston de lignaja fabriko. Ankaŭ Yang Zhaoyan ekhavis profesion.

Qi Zusheng tre ekscitiĝis kaj ekploreĝis. Yang Zhaoyan larmis apude. Ankaŭ malsekiĝis la okuloj de la gastoj.

Por la nova familio la vivo estis malfacila. Tamen ili laboris diligente kaj vivis ŝpareme. Ili prizorgis kaj amis sin reciproke. Qi decidis forigi siajn makulojn per ŝvitiga laboro kaj fariĝi honestulo. Yang ĉiam kaj ĉie helpis lin. Unu jaro forpasis. Qi ne vanigis la esperon de la ĉirkaŭaj homoj. En 1980 li plenumis 128% de sia produktita kvoto, per kio li okupis la duan lokon en la laborejo kaj fariĝis statistikisto de la laborejo. Krome li vizitis postlaboran lernejon. Li liberigis sin de ĉiuj siaj ŝuldoj per 700 juanoj, kiujn li kaj lia edzino perlaboris. Nun al ili naskiĝis bebo, kiu pli vigliĝis tiun neordinaran familion.



MARO—MIA POSTENO

de XIN YILI

Xin Yili estas 29-jara maristo. Ekde la jaro 1972 li servas sur la ŝipo "Dunhua" de la Kantona Kompanio de Transoceana Transporto kaj nun laboras kiel ĝia aganta maato. Lia familio loĝas en la urbo Kantono.

LA RED.

Mi naskiĝis en marista familio apud maro. Antaŭ la Liberiĝo mia patro servis sur eksterlanda ŝipo, li havis malsanan korpon kaŭzitan de peniga laboro. Pro tio, post la fondiĝo de la nova Ĉinio la popola registaro donis al li surteran laboron. Kiel la patro, mi tre amas la maron jam de la infanaĝo. Kelkfoje mi gape rigardis mevojn super la maro kaj esperis, ke en la estonteco mi laboros kaj vivos sur la maro tiel libere kiel la mevo.

Mi estis diplomita de supera mezlernejo en 1972, kiam la ĉina transoceana transportado estis en granda disvolviĝo kaj urĝe bezonis novajn maristojn. En la sama jaro mi varbiĝis de la Kantona Kompanio de Transoceana Transporto. Tiam ĝi estis unu el la kvin grandaj tiaj kompanioj de Ĉinio kaj posedis 43 dekmil-tonelajn ŝipojn. Ĝia ĉefa tasko estis transportado de importaj kaj eksportaj varoj en Huangpu kaj aliaj sudaj havenoj de Ĉinio. Post duonjara trejnado mi komencis servi kiel maristo sur la ŝipo "Dunhua".


La maristoj plenumas siajn laborojn sub la gvido de ĉefmaris-

to, ekz., stiri en la stirejo, ligi kaj malligi kablojn sur la ferdeko, mallevi ankron ĉe la albordiĝo de la ŝipo . . . En la komenco mi pensis, ke la laboro de maristo estas simpla. Post iom da tempo mi komprenis, ke bona maristo estas elbakita en malfaciloj.

Kiam mi unuafoje forlasis la patrujon kun nia ŝipo kaj staris kontraŭ vento sur ĝia ferdeko, mi havis grandan fieron de maristo kaj fortan amon al la maro.

Sed post unutaga navigado mi vidis alian aspekton de la maro: Sur la senlima maro muĝis forta vento balaante la marsurfacon, ondegoj ruliĝantaj el la mara profundo unu post alia sin jetis bleke al nia ŝipo. Tiam nia ŝipo kvazaŭ fariĝis ludilo, kun kiu laŭvole ludas infano. Pro terura balanciĝo de la ŝipo mi ne povis stari firme, kaj sekve mi sentis kapturnon, vomis, ne volis manĝi nek trinki.

La veterana ĉefmaristo diris al mi, ke la marmalsano estas la unua provo por la nova maristo, kiu devas ne nur ĝin venki sed ankaŭ bone labori sur la balanciĝanta ferdeko. Por rapide ako-



La aŭtoro sur posteno

modiĝi al la medio, inspire de la ĉefmaristo, mi staris sur la pruo kaj elportis la atakon de ondegoj kaj la balanciĝon de la ŝipo. Post pli ol dek tagoj mi jam ne plu sentis kapturon, bone plenumis mian servon sub helpo de malnovaj maristoj. La unua vojaĝo sur la maro komprenigis al mi, ke kompetenta maristo devas havi fortikan kordon kaj grandan kuraĝon super la malfaciloj.

Nia ŝipo navigas ĉefe inter havenoj de Ĉinio, Eŭropo kaj Afriko, transpante la Hindan Oceanon kaj Atlantikon kaj preterirante la Bonesperan Kabon kaj la Biskajan Golfon. Sur la maro ni ofte navigas en pli-ol-10-grada vento, evitante multajn rifojn kaj malprofundaĵojn. De la dua duonjaro de 1972 ĝis la komenco de 1982 ni veturadis pli ol dek fojojn sur tiu longa marlinio kaj transportis pli ol 400 000 tunojn da varoj.

Ĉiuj malnovaj maristoj scias, ke la surmara laboro estas tre peniga, tamen la postlabora vivo

estas enhavoriĉa kaj plezura.

Por ke la maristoj ĝoje pasigu postlaborajn horojn, la kompanio ekipis la ŝipojn per televidilo, vidoregistrilo, muzikiloj kaj sportaj aparatoj. Krome, en nia ŝipo funkcias postlabora poramuza grupo el talentaj junuloj. Dank' al ĝia helpo iras inter la maristoj konkursoj de ŝako, pokero kaj aliaj ludoj. Ifoje, kiam la ŝipo estas ankrita proksime de marbordo en serena vetero, ni ludas tablotenison kaj hokas fiŝojn.

Sed nin plej interesas la amuza vespero en la festaj kaj liberaj tagoj. En tiu vespero oni prezentas siajn plej bonajn programerojn. Ĝin ĉeestas ankaŭ la ŝipestro. Iuj ludas muzikilojn kaj aliaj kantas. Estas menciinde, ke nia maljuna ŝipestro Peng Hongtian bele prezentas Pekin-operon kaj ĉiufoje lia sonora kaj vasta voĉo estas bonvena.

La kolegoj alnomas min Librovermo, ĉar dum plejparto de la postlaboraj horoj mi legas literaturajojn kaj sciojn pri mar-

navigo. Mi ankaŭ ŝatas senĝene babiladi kun du aŭ tri kamaradoj samtempe. Nia parolado temas pri ŝanĝiĝo de la hejmloko, pri intimuloj, pri la homa vivo, pri nia idealo . . . Tio alportas al mi ĝojn.

Post unu- aŭ du-monata mar-navigado ni tre sopiras al la tero. Dum la tempo, kiam la ŝipo estas ankrita en haveno, ni laŭvice pririgardas la havenurbon, pitoreskejojn, ekzotikajn pejzaĝojn kaj antikvajn konstruaĵojn. Ifoje ni faris konkursojn de piedpilko, flugpilko kaj aliaj ludoj kun lokaj maristoj aŭ urbanoj. Sed ni ne serĉas drinkejon kaj noktoklubon, ĉar ili ne interesas la ĉinajn maristojn.

La tempo, kiam la ŝipo ripozas en haveno, estas ŝanco por ni ricevi leterojn el la patrujo transsenditajn de la kompanio en Kantono.


En la naŭ jaroj mi ne ĉiam bone plenumis mian servon. Foje mi eĉ volis forlasi la ŝipon, ĉar pro tia laboro estas malfacile por mi havigi amatinon.

Preskaŭ la tutan jaron ni vivas sur la ŝipo, tial ni havis malmulte da ŝancoj kontaktiĝi kun knabinoj. La junajn maristojn ofte ĉagrenas tio, ĉu ili povas trovi por si idealan fianĉinon. La kompanio kaj la marista sindikato donas grandan atenton al tiu reala problemo kaj faris multajn klopodojn por ĝin solvi, ekz., fondi svatagentejon. Junaj maristoj sin registras en la svatagentejo, prezentas siajn postulojn kaj donas al ĝi sian foton. Helpate de la svatagentejo mi havis fianĉinon, kiam mi estis 27-jara.

Mia fianĉino Liu Lan estis studentino de la Kantona Fremdlingva Instituto. Tri tagojn post nia konatiĝo mi devis

Konkurado de cent skoloj en la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj

de BA HONG



Konfuceo

EN la periodoj Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (771 a. K. — 221 a. K.) estiĝis granda socia revolucio: feraj instrumentoj anstataŭis la bronzaĵojn kaj la feŭda sistemo la sklavojn. Tiam la reprezentantaj personoj de diversaj skoloj, laŭ la interesoj de malsamaj klasoj kaj sociaj klikoj, kreis malsamajn teoriojn, komentariis la politikojn, eksplikis filozofiajn principojn kaj faris argumentadojn. La historio diris, ke en la tempo “aperis multaj eminentaj kleruloj kaj sin montris malsamaj skoloj”. Inter ili la skoloj konfuceanisma, taoisma kaj reglamentisma havis tre grandan influon. En la periodoj havis grandapaŝan antaŭeniĝon ankaŭ la literaturo kaj medicino en sia disvolviĝo.

ekveturi kun la ŝipo. Por plifirmigi nian amrilaton la svatagentejo speciale sendis diri al ŝi miajn kvaliton kaj konduton kaj ankaŭ la gravecon de la marista laboro. Post mia reveno nia kontaktiĝo antaŭenigis la amon kaj post nelonge ni geedziĝis. Nun ni jam havas fileton. Por ke mi konsciencie servu sur la ŝipo, ŝi bone faras dommastrumadon. Ŝi respektas kaj prizorgas miajn gepatrojn, kaj ankaŭ ili amas la bofilinon. Mia patrio emeritiĝis kaj flegas mian

infanon hejme. Nia tuta familio vivas en harmonio kaj feliĉo.

Kun la paso de la tempo mi ĉiam pli amas mian laboron, ĉar mi vidas la brilan perspektivon de la ĉina transoceana transporta afero. Nia kompanio nun posedas 163 dekmil-tonelajn ŝipojn. Krom la ordinaraĵoj varŝipoj, la kompanio sin provizis per grandaj cisternoŝipoj, kontenerŝipoj, fridigaj ŝipoj kaj dekmil-tonelaj pasaĝeraj ŝipoj. La ŝtato tre zorgas pri nia materia vivo. Dum la tempo de navigado ni

ricevas tagan manĝsubvencion de 2.5-3.2 juanoj. Kaj post 16-monata navigado ni ĝuas dumonatan libertempon.

Baldaŭ mi ekzameniĝos por ricevi la ofictitolon maato. Laŭ la decido de la Trafika Ministerio, la maristoj ekservintaj en la periodo 1966-1976 devas meti sin al tia ekzameno. Mi estos ekzamenita pri fremda lingvo, matematiko, mekaniko, desegno kaj aliaj 9 objektoj. Nun mi energie min preparas por tio.



KONFUCEO — LA FONDINTO DE KONFUCEANISMO

Konfuceo (551 a. K. — 479 a. K.) estis pensulo, politikisto, edukisto de la antikva Ĉinio kaj

la fondinto de Konfuceanismo. Liaj prapatroj estis nobeloj de la regno Song, sed poste fuĝis al la regno Lu, kaj kiam naskiĝis Konfuceo, la familio jam fariĝis malriĉa.

Lia politika idealo estis subteni la kadukan sklavoposedan sistemon. Li riproĉis tiujn, kiuj kontraŭis liajn tezojn pri politiko, kiel “ribelulojn”. Tial la reprezentantoj de la nova bienula klaso lin respektis, sed ne ŝatis. Li vojaĝis tra multaj regnoj por trovi ŝancon fariĝi altrangulo kaj praktiki siajn politikajn idealojn. Sed li mal-

sukcesis, malgraŭ sia dekvar-jara klopodado. En liaj lastaj jaroj li revenis la hejmlokon kaj tie reordigis la antikvajn verkojn kaj faris edukadon.

Konfuceo faris grandan kontribuon en la reordigo de la antikvaj verkoj. Li reordigis ses specojn de ili: “Ĵi” pri filozofio; “Ŝi”, kolekto de antikvaj poemoj; “Li” pri la leĝa sistemo kaj rito de Zhou-dinastio; “Ŝu”, kolekto de la politikaj dokumentoj de antaŭhistorio kaj la tri dinastioj Xia, Shang kaj Zhou; “Printempo kaj Aŭtuno”, kroniko de 242 jaroj pri la periodo Printempo kaj Aŭtuno; “Jue” pri muziko kaj ĝia politika efiko. La ses libroj estis ankaŭ lernolibroj uzitaj de Konfuceo por instrui lernantojn. Escepte de “Jue” ĉiuj aliaj kvin estas konservataj ĝis nun.

La “Ŝi” kompilita de Konfuceo estis la plej frua poemaro en Ĉinio. Ĝi enhavas la poemojn de ĉirkaŭ 500 jaroj de la komenco de la Okcidenta Zhou-dinastio (la 11-a jarcento a. K.) ĝis la meza periodo Printempo kaj Aŭtuno (la 5-a jarcento a. K.). Ĝia plejparto estas popolaj poemoj, el kiuj nemalmultaj malkaŝas la tiaman malluman kaj kaosan politikon, la subpremadon kaj ekspluatadon de la popolo fare de la nobelaj regantaroj. Iuj traktas pri laboro de popolanoj aŭ ties amo, duaj pri kultado al dioj aŭ prapatroj kaj triaj pri admiro al eminentaj personoj de la reganta klaso. Kiel historia materialo ĝi enhavas ankoraŭ antikvajn legendojn pri la deveno de la ĉina nacio, kaj notojn pri konkreta organizado de agrikultura produktado, pri popola vivo, kaj pri naturaj plagoj. La kolekto de poemoj havis profundan influon al la disvolviĝo de

Memordomo de Qu Yuan konstruita apud la rivero Miluo





Bian Que diras al la reĝo de Qi-regno: "La malsano de via reĝa moŝto jam profundiĝas, sen kuraco ĝi graviĝos."

la ĉina literaturo de la pasintaj pli ol 2 000 jaroj.

Antaŭe, nur nobeloj rajtis ricevi edukon. Konfuceo ja asertis, ke ĉiuj homoj sendistinge rajtas esti edukitaj, kaj en siaj lastaj jaroj komencis privatan edukadon. Li malfermis la pordon de eduko ankaŭ al ordinaraj popoloj. Tial, inter liaj disĉiploj troviĝis kaj filoj de nobeloj kaj ordinaruloj. Oni diras, ke li havis ĉirkaŭ 3 000 disĉiplojn. Li estis la edukisto en la ĉina histo-

rio, kiu la unua funkciigis lernejon.

Konfuceo ne sukcesis en sia politika idealo dum la vivo, sed post sia morto li estis glorigita de la reganta klaso kiel sanktulo en la pli-ol-2 000-jara feŭda socio de Ĉinio. La feŭda bienula klaso distrumpetis pri reformo kaj renovigo, antaŭ ol ĝi kaptis la regpotencon, sed post kiam ĝi starigis reĝimon, ĝi bezonis stabiligi ĝin kaj protekti la feŭdan ordon. Por tio ĝi bezonis la

konservativan penson de Konfuceo.

LAOZI — LA FONDINTO DE TAOISMO

Laozi havis alian nomon Li Er. Li naskiĝis en la regno Chu kaj estis samtempulo kun Konfuceo, sed liajn precizajn naskiĝtagon kaj mortotagon oni ne scias. Lia ĉefa verko estas "Taodekin", kiu ampleksas 5 000 ĉinajn ideografiajn.

Ankaŭ "Taodekin" havas alian nomon "Laŭzi", ĉar ĝi entenas la filozofian penson de Laozi. Li opiniis, ke "tao" estas la naturo kaj origino de la universo. Lia filozofia penso estas ideisma, sed entenas simplan dialektikon. Lia politika ideologio asertis, ke "la regnoj estu malgrandaj kaj la popoloj malmultaj", "la najbaraj landoj aŭdu unu de la alia kokerikon kaj bojadon, sed la popoloj neniam intervizitu". Li konsilis "senfaran regadon", por ke "la popoloj malhavu scion kaj dezirojn". Tio efektive kontraŭis ĉiujn sociajn progresojn kaj respiegulis la penson de la kaduka sklavo-posedanta klaso.

HAN FEI — REPRESENTANTO DE LA REGLAMENTISMO

Han Fei (280 a. K. — 233 a. K.) estis nobelo de la regno Han. Antaŭ Han Fei, jam aperis multaj reglamentistoj, li koncentre lernis iliajn tezojn kaj plurfoje skribis al la reĝo de Han-regno por proponi al li reformon, sed estis rifuzita. Anstataŭe li komencis verki. La reĝo de la regno Qin legis liajn verkojn kaj lin tre admiris. Poste li iris al Qin, sed estis enviita kaj kalumniita de aliaj, kaj devigita sin mortigi per veneno.

Liaj tezoj estis fortigi la monarkian centraligon, likvidi la privatajn fortojn de la nobeloj, enoficigi ekzamine elektitajn personojn kun praktikaj spertoj, instrui al la tuta lando leĝokodojn, agi laŭ la modelo de oficistoj, malpermesi privatajn lernejojn, praktiki premiadon kaj punadon, laŭdi la agrokulturon kaj militservon por riĉigi kaj potencigi la regnon.

La reĝo de Qin fundamente aplikis lian politikan teorion, praktikis la reglamentadon, riĉigis kaj potencigis la regnon kaj fine unuigis Ĉinion.

QU YUAN — PATRIOTA POETO

Qu Yuan (340 a. K. — 278 a. K.) naskiĝis en la regno Chu. Kiel Chu-regna kortegano li iam partoprenis en regado kaj politikaj aferoj. Li asertis, ke por la intereso de Chu, ĝi devas alianciĝi kun la regno Qi kaj kontraŭi la regnon Qin. La reĝo antaŭe tre fidis lin, sed poste kredis kalumniojn kaj malkonfidis lin. Qu Yuan estis ekzilita norden de la rivero Hanshui. Kun malĝojo kaj indigno li verkis la faman longan poemon "Lisao" por elverŝi siajn malĝojon kaj malkontenton.

Post kiam Qu Yuan estis ekzilita, la por-qin-regnaj personoj en la regno Chu okupis la gravajn lokojn. La regno Qin trompis la regnon Chu, proponante, ke se ĝi rompos sian rilaton kun Qi, Qin rekompencos ĝin per terpeco de 600 kvadrataj lioj (unu lio=duonkilometro). De tiam Chu izoliĝis kaj estis ofte invadita de Qin. La trompita reĝo de Chu volis revoki Qu Yuan al la kortego. Kun forta deziro servi al la patrolando, Qu Yuan revenis al la ĉefurbo, sed li estis

ree kalumniita kaj ekzilita suden de la rivero Jangzi.

Ekzilita, Qu Yuan restis ĉiam maltrankvila pri sia patrolando kaj la popolo. Kiam li informiĝis, ke la ĉefurbo estis konkerita de Qin-regnaj trupoj, li sin ĵetis en la riveron Miluo (branĉo de la rivero Xiangjiang en Hunan-provinco) je la 5-a de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro.

En la gubernio Taojiang de Hunan-provinco konserviĝas ĝis hodiaŭ la restaĵo de Qu Yuan. Ĉe la loko en la rivero Miluo, kie Qu Yuan dronis, oni konstruis por li tombon kaj memordomon. La 5-an de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro ĉiujare okazas la drakboata festo por memori lin. Tiam en la boata konkurso oni ĵetas glurizajn bulojn envolvitajn en fragmitaj folioj en riveron, kredante ke manĝinte la glurizajn bulojn, la fiŝoj ne plu manĝos la kadavron de Qu Yuan.

BIAN QUE — LA PATRO DE LA ĈINA MEDICINO


Bian Que estis popola kuracisto de la regno Qi. Por diagnozo li emfazis ekzameni la radiusan arterion, rigardi la vizaĝon kaj la agadon kaj aŭskulti la voĉon. Li vojaĝis tra grandaj urboj de multaj regnoj por kuraci malsanulojn. Legendo diras, ke iutage li venis al Linzi, la ĉefurbo de la regno Qi, kaj vidis la reĝon Huangong. Trovinte lian vizaĝon nenormala, li diris al li: "Via reĝa moŝto malsanas, kvankam ne tre grave. Tamen vi devas esti kuracata ĝustatempe!" La reĝo rektigis sian korpon, ekmovis siajn brakojn kaj diris: "Mi estas sana." Li adiaŭis Bian Que kaj diris al siaj sekvantoj:

"Kuracisto ĉiam avidas monon, li eĉ volas kuraci sanulon." Post kvin tagoj Bian Que refoje vidis la reĝon kaj diris al li: "La malsano de via reĝa moŝto jam profundiĝas, sen kuraco ĝi graviĝos." La reĝo estis iom malkontenta. Post kvin tagoj Bian Que speciale venis al la reĝo kaj diris al li: "La malsano de via reĝa moŝto jam eniris en vian abdomenon. Vi estos en danĝero sen kuraco." Aŭdinte tion la reĝo estis tre malkontenta, kaj Bian Que devis malvole retiriĝi. Post pliaj kvin tagoj Bian Que ree vizitis la reĝon. Sed nenion dirinte, li foriris. La reĝo sendis demandi lin, kaj la kuracisto respondis: "Se la malsano estas ekstera, varma kompresio povas kuraci ĝin. Se la malsano estas pli profunda, akupunkturo povas kuraci ĝin. Se ĝi eniris en la abdomenon, drogvino povas forigi ĝin. Nun ĝi jam eniris en lian medolon, ĝin mi ne povas kuraci." Post nelonge la reĝo mortis.

Post kiam Bian Que venis al Qin, li fariĝis tre fama. Eĉ la reĝo de Qin petis lian kuracoon, sed tio vekis ĵaluzon ĉe la reĝa kuracisto, kiu sendis kaŝmortigi lin.

Post la morto de Bian Que, lia teorio pri medicino estis kompilita de posteuloj en medicinan verkon, kiu estas tre valora literaturo de la ĉina medicino.





Fosilia dinosaŭro trovita en 1957 en Ma-menxi, Hechuan-gubernio, Sichuan-provinco



Dinosaŭroj de Ĉinio

de DONG ZHIMING

EN la mezozoika erao, antaŭ 180 milionoj da jaroj, kiam ankoraŭ ne aperis la homaro, la terglobon regis la dinosaŭroj. Tiam la vetero estis seka kaj varma. Grandparto de la tero estis kovrita de arbaro kaj aliaj vegetaĵoj. Sur la tero abundis lagoj kaj marĉoj, kio tre taŭgis al la rampuloj. Dinosaŭroj mastris ĉion en la mondo. Sed antaŭ 65 milionoj da jaroj la vetero fariĝis malvarma, la dinosaŭroj ĉiuj pereis.

En 1823 brita paleontologo Bar-kland malkovris mandiblon de giganta besto, megalosaŭro. En 1824 brita kuracisto Mattell en sia artikolo priskribis fosilion de igvano-donto, kiun li trovis du jarojn pli frue. Tiamaniere oni komencis esplori la dinosaŭrojn.

Sed Ĉinio komencis esplori dinosaŭrojn nur antaŭ pli ol 50 jaroj. Dum tiu duonjarcento oni jam malkovris proksimume cent speciojn de dinosaŭroj en Ĉinio. Preskaŭ ĉiuj konataj specioj en la mondo estas trovitaj en nia lando. Krom fosiliaj ostoj de dinosaŭroj estas

trovitaj ankaŭ multe da fosilioj de iliaj ovoj kaj spuroj. En niaj 24 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj oni trovis dinosaŭrajn fosiliojn.

La ruso Manakin en sia scienca esploro la unua malkovris dinosaŭrajn fosiliojn interne de Ĉinio. En 1902 li kolektis kelke da bestaj fosilioj en Jiayin-gubernio de Heilongjiang-provinco. En 1916-1917 alia ruso Kriĥtofoviĉ elterigis amason da dinosaŭraj fosilioj en la sama loko, kiuj, post esplorado, estis gigantaj hadrosaŭroj kaj nomiĝis manĉursaŭroj.

En 1913 la franca pastro R. Mertens malkovris fosiliojn de la fama eŭhelopo en Mengyin-gubernio de Shandong-provinco. Ke en Ĉinio oni multfoje elterigis dinosaŭrajn fosiliojn, vekis atenton de la eksterlandaj paleontologoj. De 1921 ĝis 1932 sciencistoj usonaj, francaj, svisaj kaj alilandaj unu post alia venis al Ĉinio por esplori kaj kolekti dinosaŭrajn fosiliojn. La Mezazia Esplora Grupo de Usono atingis tre eminentajn sukcesojn en Erenhot,

Interna Mongolio, kaj en la Mongola Popola Respubliko.

La ĉinaj sciencistoj komencis esplori fosiliojn de dinosaŭroj en 1933. Profesoro Yang Zhongjian kolektis fosiliojn en la provincoj Sichuan, Yunnan kaj Gansu kaj la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj en 1941 li la unua ekspozis skeleton de Lufengosaŭro, specio de la ĉinaj dinosaŭroj, en la urbo Chongqing, Sichuan-provinco.

Post sia fondiĝo la nova Ĉinio starigis propran Instituton pri Antikvaj Vertebruloj sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. De tiam Ĉinio komencis sisteman kaj laŭplanan esploron pri dinosaŭraj fosilioj.

La ĉinaj dinosaŭraj fosilioj abundas en la provincoj Yunnan, Sichuan kaj la Interna Mongolio.

En la frua periodo de la mezozoiko Lufeng en Yunnan-provinco estis malgranda interna baseno. La tiea varma kaj humida vetero kune kun la prosperaj vegetaĵoj tre taŭgis al dinosaŭroj. Tial tie estis enterigitaj multaj dinosaŭroj,

ekzemple Lufengosaŭroj, Junnana-saŭroj, giposaŭroj, tatisaŭroj kaj aliaj.

La 200 000-kvadrat-kilometra Sichuan-baseno ĉirkaŭata de montoj estas formita el kontinenta demetiĝo de ruĝaj tertavoloj en la mezozoiko, pli ol 3 000 metrojn dika. Tie oni trovis dinosaŭrajn fosiliojn en pli ol 40 lokoj. En 1957 oni elterigis gigantan fosilian Heĉuan-an Mamensisaŭron en Hechuan, Sichuan-provinco, 22 metrojn longan, kiu estas la plej granda kaj plej kompleta fosilia dinosaŭro elterigita en Azio. En 1974 oni faris sisteman elterigon en Zigong kaj akiris 10 tunojn da fosilioj, inkluzive tiujn de Emejsaŭroj, Siĉuanosaŭroj, Tuogĝangosaŭroj k.a. En Dashanpu, antaŭurbo de Zigong, oni elterigis 40 tunojn da dinosaŭraj fosilioj. La tie trovita Ŝusaŭra faŭno estas la plej abunda en la meza juraso epoko. La Sichuan-baseno estas trezorejo de dinosaŭraj fosilioj. La tie trovitaj fosiliaj dinosaŭroj similis al la fosiliaj diplodokoj kaj kamarasaŭroj de la malfrua juraso en norda Ameriko.

En la geologiaj tavoloj de la frua kretaceo en norda Ĉinio estas trovitaj fosilioj de psitakosaŭroj je la grandeco de hundoj, kun papaga beko. Ili vivis ofte kune kun pterosaŭroj kaj estis aparta faŭno en Azio. La paleontologoj nomas ĝin psitakosaŭr-pterosaŭra faŭno.

En la sesa jardeko de la nuna jarcento ĉinaj sciencistoj faris trijaran esploron en la basenoj Junggar kaj Turpan de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. En la esplorado ili malkovris la pterosaŭran faŭnon de Wuerho. Dum la Pekina Geologia Muzeo faris kvarjaran elterigadon en Zhucheng, Shandong-provinco kaj akiris pli ol 30 tunojn da fosilioj, inkluzive de la plej granda hadrosaŭro en la mondo — giganta Shandongosaŭro.

En 1959 kaj 1960 la ĉinaj kaj sovetuniaj paleontologoj organizis komunan esplor-grupon, kiu faris grandskalan elterigadon en Erenhot kaj Alxa en la Interna Mongolio kaj trovis fosiliojn de hadrosaŭroj, karnosaŭroj, ankilosaŭroj kaj aliaj.

La jam kolektitaj dinosaŭraj fosilioj, kiaj tiuj de Laiyang kaj Zhucheng de Shandong-provinco, Erenhot de la Interna Mongolio, Nanxiong de Guangdong-provinco, la baseno Turpan de Xinjiang, konstatas, ke pli ol duono de la ĉinaj dinosaŭroj vivis en la malfrua periodo de la kretaceo. En tiu epoko vivis ĉefe hadrosaŭroj, titanosaŭroj kaj trinosaŭroj. Plejparto de ili similis al la samtempaj en norda Ameriko. Tio pruvis, ke en la malfrua periodo de la kretaceo la kontinento de Azio estis ligita kun tiu de Ameriko. Tiutempaj dinosaŭroj estis nomitaj hadrosaŭr-titanosaŭra faŭno.

Dum pli ol duonjarcento Ĉinio akumulis multajn materialojn por esplori dinosaŭrojn. La ĉinaj sciencistoj pri antikvaj vertebruloj faris vastan interŝanĝon de sciencaj informoj kaj specimenoj, kondukis internaciajn simpoziojn kaj elterigadon. La ĉinaj fosiliaj dinosaŭroj estis eksponitaj en Tokio, Osaka kaj Fukuoka, Japanio, en 1981 kaj en Aŭstralio en 1982.



Fosilio de dinosaŭro trovita en la gubernio Yongchuan, Sichuan-provinco

Iom pri la problemo de maljunuloj

LA organizo de Unuiĝintaj Nacioj difinis ĉi-jaron la Jaro de Maljunuloj. Ĝi decidis okazigi, en Vieno, mondan kunvenon pri tiu problemo de la 26-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto ĉi-jare. Ĝin ĉeestos pli ol 1 500 reprezentantoj el 110 landoj. En la kunveno oni aprobas agadplanon pri la problemo de maljunuloj kaj kolektos informojn pri tiuflankaj laboroj de diverslandaj registaroj kaj proponojn de fakuloj pri la solvo de tiu problemo. De 1981 ankaŭ iuj regionaj kunvenoj metis tiun problemon en sian tagordon.

Nun en la mondo ĉiam pli kreskas la nombro de maljunuloj. Tiuj, kiuj aĝas super 60 jaroj, konsistigas pli ol 12% de

la totala nombro de la monda loĝantaro, kaj tiuj kiuj aĝas super 65 jaroj, konsistigas 6%. Laŭ la difino de la Unuiĝintaj Nacioj, tiu lando, kies maljunuloj kun aĝo de pli ol 65 jaroj superis 7% de la totala nombro de la landa loĝantaro, estas lando kun "maljuniĝinta loĝantaro". Laŭ statistiko, tiaj landoj estis 15 en 1950, kaj nun pli ol 50. En la evoluintaj landoj maljuniĝo de la loĝantaro fariĝis problemo okulfrapa. La maljunuloj kun aĝo super 65 jaroj konsistigas 15% de la totala loĝantaro en FR Germanio kaj Svislando, 14.3% en Francio, 14% en Anglio, 12% en Italio, 11% en Usono kaj 9% en Japanio. La problemo ĝenos

Junulino surbrustigas al avino ruĝan floron por deziri al ŝi feliĉon kaj longan vivon.



ankaŭ la disvolviĝantaj landojn post iom da jaroj, kvankam ili nun ankoraŭ ne sentas tion.

Ĉar en la nuna mondo estas tiam da maljunuloj, do sekvas serio da problemoj, ekz. kiel vivteni tiujn maljunulojn, kiel respekti iliajn socian pozicion kaj rajtojn kaj kiel havigi al ili feliĉan vivon en iliaj lastaj jaroj. Ĉar ili jam plenumis sian devon al la socio, ili devas esti respektataj kaj prizorgataj de la socio, post kiam ili perdis laborkapablon. Pro la diferencoj de la sociaj sistemoj, ekonomia stato kaj klereco en diversaj landoj, la problemoj estas malsame traktata.

En la disvolviĝantaj landoj la maljunuloj plejparte dependas de

siaj gefiloj en la vivo. En la socio ekzistas certgrade bona tradicia moralo pri respektado al maljunuloj. En la pasinta novembro okazis en Singapuro la tria "Semajno por Respekti Maljunulojn", kiu celis vekti pli grandan atenton al la maljunuloj. En la fino de la pasinta oktobro la latinamerikaj landoj okazigis en Kolombio kunvenon pri familioj kaj maljunuloj. Tiu kunveno postulis, ke la diversrondaj personoj respektu kaj prizorgu la maljunulojn, por ke ili ludu aktivan rolon en la familio kaj socio. Antaŭ kelkaj jaroj Meksikio fondis la "Tutlandan Asocion de Maljunuloj" kaj koncernan organizon por prizorgi la maljunulojn, kiuj per-

dis memstarecon en ekonomio. Kaj ĝi ankaŭ starigis gastejon por akcepti nur senhejmajn maljunulojn. Sed pro subevoluo de la ekonomio kaj malalta vivnivelo, al multaj disvolviĝantaj landoj mankas kompleta sistemo de laborprotekto kaj bonstatigo, precipe en la kamparo de tiuj landoj la maljunuloj vivas pli malfacile.

En la evoluintaj landoj, la maljunuloj ĝenerale ĝuas pension kaj subvencion kaj havas certan garantion en la materia vivo. Sed pro la ekonomia regreso kaj inflacio ilia efektiva enspezo multe malpliĝis. Nemalmultaj emeritoj devas iom perlabori. Laŭ statistiko, Usono havas 25 milionojn da maljuni-

En bankedo gejunuloj tostas pro la longa vivo de gemaljunuloj.

Festo de Maljunuloj

La 20-an de junio ĉiujare, en la vilaĝoj de koreoj en la gubernio Tailai, Heilongjiang-provinco, oni okazigas kunvenon por deziri longan vivon al la gemaljunuloj kun aĝo super 60 jaroj. Kaj tiun tagon oni nomas Festo de Maljunuloj.

La festo alportas ĝojon al la gemaljunuloj kaj donas al la gejunuloj edukon pri la socialisma moralo respekti la maljunajn kaj prizorgi la junajn.



loj kun aĝo super 65 jaroj, el kiuj kvarono vivas sub la linio de malriĉeco difinita de la registaro. Estas atentinde, ke pro la disfalo de la familia strukturo, en la evoluantaj landoj la maljunuloj ofte sentas solecon kaj mornecon en siaj lastaj jaroj. Oni raportis, ke en Anglio nur 4% de la maljunuloj vivas kune kun siaj edziniĝintaj filinoj, 0.7% de la edziĝintaj filoj loĝas kune kun siaj gepatroj. Enketo de 1979 montris, ke en Anglio maljunuloj, kiuj vivas sole, troviĝas en 2 milionoj da familioj. Eĉ en iuj familioj, en kiuj la gepatroj vivas kune kun siaj gefiloj, ili ne estas respektataj, se ili dependas de siaj gefiloj en la vivo. En nemalmultaj lan-

doj maljunuloj estas malbone traktataj hejme. Pri tio la Usona Parlamento faris unujaran enketadon kaj trovis, ke ĉiujare ĉirkaŭ miliono da maljunuloj estas turmentataj de siaj gefiloj en Usono.

En Ĉinio la konstitucio difinas, ke ĉiuj gefiloj havas devon vivteni siajn gepatrojn kaj ĉiu emerito ĝuas ĉiumonate pension kaj senpagan kuracadon. En la kamparo multaj popolaj komunumoj kaj brigadoj starigis domon por senparencaj maljunuloj. Tiuj produktaj brigadoj, kiuj ne havas maljunulan domon, sendas personojn aparte por prizorgi ilian vivon. Kvankam la socialisma Ĉinio havas la tradician

moron respekti maljunulojn, sed ekzistas iuj personoj, kiuj krude traktas siajn gepatrojn, aŭ ne volas plenumi la devon vivteni ilin, kaj iuj eĉ turmentas siajn gepatrojn.

La problemo de maljunuloj estas urĝe solvenda. Oni devas atenti psikon kaj fiziologion de maljunuloj kaj devas ankaŭ studi kaj solvi la problemon kiel havigi al maljunuloj ekonomiajn kaj sociajn garantiojn. Nuntempe ne ekzistas plano pri maljunuloj, kiu estas taŭga por ĉiuj landoj, nek estas stabila la disvolviĝo de gerontologio kaj medicino por maljunuloj. En iuj landoj eĉ ne troviĝas tiaj institucioj. Tamen zorgado al mal-

La gemaljunuloj dancas kun ĝojo dum la festado.



junuloj estas la komuna tasko de ĉiuj landoj. Ĉi-jare la higiena tago de la mondo elmetis la sloganon "Por rejunigi la maljunulojn", proponante, ke oni ne rigardu maljunulojn nur kiel ŝarĝon de la familioj kaj socio, sed lasu ilin aktive partopreni en diversaj sociaj aktivadoj, por ke ili vivu en siaj lastaj jaroj pli feliĉe kaj pli signife.

Nun maljunuloj en iuj okcidentaj landoj klopodas por akiri kaj protekti siajn rajtojn. Ekz. en Usono fondiĝis "Federacio de Emeritoj", "Tutlanda Komitato de Maljunaj Civitanoj" kaj aliaj organizoj. Ili postulas, ke oni altigu la enspezon de emeritoj, plibonigu la kondiĉojn de kura-

cado por la maljunuloj kaj havigu al ili sociajn bonstatigojn, kaj tio vekis atenton de diversaj rondoj. En Japanio aperis apartaj servoj por emeritoj. En iuj landoj, maljunuloj memvole faris laborojn utilajn al la socio, ne postulante pagon, per kio ili ne nur plezurigas sin, sed ankaŭ estas respektataj de la publiko. Estas ankaŭ maljunuloj kiuj vizitas kurson por maljunuloj en universitato kaj vivas kolektivivan vivon.

La problemo de maljunuloj estas studata en diversaj landoj. Iuj fakuloj proponis ke oni plifortigu sanprotektadon al la malfortaj kaj malsanaj maljunuloj. Iuj fakuloj de la evoluantaj

landoj opinias, ke la socio devas havigi al la energioplenaj maljunuloj kondiĉojn por perfektigi ilian scion kaj disvolvi ilian rolon. Multaj emfazis la gravecon de protektado de familiaj rilatoj en solvado de la problemo de maljunuloj. Ili opinias ĝusta vojo por solvi la problemon la ĉinan manieron, ke la maljunulojn prizorgu ĉefe familioj kaj krome ankaŭ kolektivo kaj ŝtato. Halfadan Mahler, estro de la Monda Higiena Organizo, alvokis la industriajn landojn revenigi maljunulojn al ilia hejmo, kaj atentigis la disvolviĝantaj landojn ne forlasi sian bonan tradicion nek apartigi la maljunulojn disde la familio kiel la okcidentaj landoj.

Avino kantas kaj dancas kun sia nepo en brako.





Teksbirdo

En la rezervejoj de la provinco Yunnan de Ĉinio vivas speco de birdo povanta teksti, kaj oni donis al ĝi la interesan nomon teksbirdo.

La teksbirdo subordas al *Lonchura*, kaj havas la aspekton de pasero. Dum generado la virbirdo aspektas pli bela, kaj la plumoj sur la kapo kaj la brusto fariĝas flavaj, dum la plumoj de la vangoj kaj gorĝo fariĝas kaŝtankoloraj. Sed la plumoj de la ina birdo havas nenian ŝanĝiĝon, ĉar ĝi ne bezonas afekti antaŭ la virbirdo.

La laboremaj teksbirdoj bazas sian amon sur kuna laborado. Ili ligas per vegetalaj fibroj grandajn foliojn sur altaj arboj, kiujn la paro poste kunkudras en sakon kaj kovras la internon per argilo. Tiel pretiĝas likimuna nesto. La nesto pendanta sur arbo tre similas al kalabaso.

Estas mirige, ke la paro ne loĝas en la sama nesto. Ĉiu el la paro havas sian propran loĝejon. La paro unue konstruas neston por la ina, poste por la vira. Kaj tiel oni povas vidi almenaŭ du nestojn sur unu arbo loĝatajn de paro da teksbirdoj.

Mandarenaj anasoj

En parkoj de multaj urboj de Ĉinio oni povas vidi diversajn akvo-birdojn, el kiuj la mandarenaj anasoj (*Aix galericulata*) estas la plej ŝatataj. Ili vivas en paro, kaj tiel la ĉinoj priskribas dolĉajn geedzojn kiel mandarenajn anasojn. Laŭ klasifikado la mandarena anaso subordas al la ordinara anaso, sed neniu birdo el la anasa familio estas tiel bela kiel la mandarena anaso. La mandarenaj anasoj vivas ĉefe en Ĉinio.

Vintre ili vivas en la baseno de la rivero Jangzi kaj la sudorienta marbordo aŭ en la varmetaj rivervaloj de Mingjiang kaj Jialing. Somere ili vivas en la Nordoriento kaj Interna Mongolio. Survoje de ilia vojaĝo ili ofte paŭzas en la provincoj Shandong, Hebei kaj Gansu.

La unua rezervejo por la mandarenaj anasoj estas establita en Pingnan-gubernio en la nordorienta Fujian-provinco. La rivero Baiyan fluas sudorienten en la Orientan Ĉinan Maron. Ĉirkaŭ mil mandarenaj anasoj ĉiujare travintras tie en larĝafoliaj arbaroj.

Ĉe la tagiĝo la birdoj naĝas en la akvo. De la 10-a horo ĝis la 15-a ili ripozas sur ŝtonoj aŭ sablejoj ambaŭborde de la rivero. Post tio ili serĉadas nuksojn de larĝafoliaj fagacoj. Post mallumiĝo la birdoj serĉadas en rizkampo grajnoj postlasitajn en rikolto. Matene de la sekva tago, ili denove amuziĝas sur la akvo.

Ĉiun printempon la mandarenaj anasoj flugas de suda Ĉinio al la nordo, al la lokoj kun arbaroj kaj akvejoj. La alia rezervejo por mandarenaj anasoj troviĝas en la montaro Changbai, tre konvena somerumejo por la birdoj. Sur la trunkoj de la altaj arboj ĉ. 20 metrojn super la tero, estas multaj kavoj, kiuj estas utiligataj de la birdoj kiel ilia nesto. La birdidoj naskiĝas en kavoj. Ĉe la eloviĝo la birdidoj jam estas naturdotitaj per bela plumaro. Ili rigardas kaj pepas. La sekvan tagon la patrino flugas sur la akvon kaj la idoj saltas sur



la herbejojn sub la arboj kaj poste iras en la akvon kaj ekaĝas ĉirkaŭ la patrino. Post somero la birdidoj estas jam plenkreskaj.

Malfrue en aŭtuno, la mandarenaj anasoj flugas en grupoj de la nordo al la sudo por travintri.

Loriso

La loriso estas tre ridinda kaj aminda, kaj ĝia malmoviĝemo estas tre miriga. Oni povas vidi ĝin en la arbaro de la rezervejo en Xishuangbanna de Yunnan-provinco, Ĉinio. En la arbaro oni povas vidi brunajn vilajn globojn, ĉiu en grandeco de kato. Jen estas lorisoj. Lorisoj buligas sin kaj pendigas sin de sur la branĉoj de altaj arboj. Ili dormas tiel profunde, ke eĉ muĝo de rabobesto ne povas vekti ilin. Ili troviĝas nur en la arbaroj de la varma kaj mezvarma zonoj en la sudoriento de Azio. Kaj en Ĉinio oni vidas ilin nur en kelkaj lokoj de Yunnan kaj Guangxi.

Falas vespera krepusko en la arbaro. Kaj la bestoj, kiuj aktivis nokte, ekvigliĝas. Kun mallaŭta bleko la lorisoj viglas sur la arboj. Fakte ili ne estas tiel malmoviĝemaj kiel oni opinias. Ili preferas serĉi manĝaĵojn nokte por eviti la konkuron kun aliaj bestoj.



Lorisoj estas multe pli grasaj ol simioj kaj pro tio moviĝas tre malrapide. Ili povas nur rampi, sed ne salti. Tamen, pro longtempa aktivado dum la nokto, la lorisoj havas mirindan vidkapablon. Ili grandaj rondaj okuloj povas vidi ĉiajn manĝeblaĵojn en la nokto.

La lorisoj povas manĝi diversajn manĝaĵojn. Ili ŝatas kapti dormantajn birdojn. Post frandado de birdoj ili ofte formanĝas ankaŭ ties ovojn. Ankaŭ lokustoj kaj diversaj fruktoj estas iliaj manĝaĵoj.

Ekde 1962 la loriso estas difinita en Ĉinio kiel unu el la raraj bestoj protektataj de la ŝtato.


Dinosaŭroj de Ĉinio

Multspina Tuojiang-saŭro sep metrojn longa



Fosilia dinosaŭro eksponata en muzeo

Imagita dinosaŭra vivo






La antikva urbo Kaifeng



Fotoj de ZHOU QINIC

La nova aspekto de Kaifeng. Proksime estas la antikva Draka Kiosko.






La Flava Rivero



La Fera Pagodo

Ligna budhostatuo kun mil manoj kaj mil okuloj en la templo Xiangguo



La antikva vidindejo Gucuitai nun servas kiel parko.



